# EL POPOLA ĈINIO

中国报道


6
1975





Plugi la maron *(olepentrajo)* de **Tang Ĝining** kaj **Ju Guohong**

# Forpasis Kamarado Dong Bivu



*Portreto de Kamarado Dong Bivu*

58 Minutojn post la 7-a de la 2-a de aprilo, 1975 en Pekino, kamarado Dong Bivu, membro de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, membro de la Konstanta Komitato de la Politika Buroo de KPĈ kaj vicprezidanto de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso, forpasis pro malsano malgraŭ kuracado je la aĝo de 90 jaroj.

Kamarado Dong Bivu estis unu el la fondintoj de la Komunista Partio de Ĉinio, eminenta membro de la Komunista Partio de Ĉinio, granda revolucia batalanto de la ĉina popolo kaj unu el la elstaraj gvidantoj de la Partio kaj la ŝtato.

Komarado Dong Bivu faris senmortan kontribuon por la Partio kaj la popolo en longa revolucia batalado kaj estas kore amata kaj respektata de la tuta Partio, la tuta armeo kaj la tuta popolo.

Post la morto de kamarado Dong Bivu, organiziĝis funebra komitato kun kamaradoj Maŭ Zedong, Ĝoŭ Enlaj, Vang Hongven, Kang Ŝeng, Je Gianjing, Deng Hiaŭping k.a. kiel membroj.

En la 7-a de aprilo, okazis en Pekino solena ceremonio por funebri pri kamarado Dong Bivu. Kaj tiutage la nacia standardo estis hisita duonmaste en funebro tra la tuta lando.

En la halo de funebra ceremonio pendis portreto de la forpasinta kamarado Dong Bivu kaj lia cindrourno kovrata per la flago de la Komunista Partio de Ĉinio estis metita.

En la halo lokiĝis girlando oferita de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj girlando oferita de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio. Ankaŭ aliaj gvidantoj

de la Partio kaj la ŝtato oferis sian girlandon.

En la halo estis metitaj ankaŭ girlandoj oferitaj de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso, la Ŝtata Konsilantaro, la Milita Komisiono de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, la Tutlanda Komitato de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco, la Kancelario de la Centra Komitato de KPĈ kaj aliaj organizoj.


La funebran ceremonion ĉeestis niaj partiaj kaj ŝtataj gvidantoj Vang Hongven, Je Gianjing, Deng Hiaŭping, Ĝu De, Ĝang Ĉunkiaŭ, Giang King, Jaŭ Venjuan, Ĉen Hilian, Gi Dengkuj, Hua Guofeng, Vu De, Vu Gujhian, Su Ĝenhua, Ni Ĝifu, Guo Moĵuo, Hju Hiangkian, Nie Ĵongĝen, Ĉen Jun, Ĝang Dingĉeng, Caj Ĉang, Ulanfu, Ngapo Ngaŭang-Ĝigme, Ĝoŭ Gianĵen, Hju Deheng, Li Suven, Jaŭ Lianvej, Vang Ĝen, Ju Kiuli, Gu Mu, Sun Gian; Ŝen Janbing, vicprezidanto de la Tutlanda Komitato de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco, Giang Hua, prezidanto de la Plej Supera Popola Juĝejo; kaj membroj kaj alternaj membroj de la Centra Komitato de KPĈ, membroj de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso kaj la Konstanta Komitato de la Ĉina Popola politika interkonsiliĝa Konferenco, respondeculoj de ĉiuj departementoj de la Centra Komitato de KPĈ kaj la ŝtato, respondeculoj de ĈPLA, Pekino kaj Hubej-provinco, laborantoj kaj amasaj reprezentantoj, entute pli ol du mil personoj.

La ceremonion prezidis vicprezidanto Vang Hongven kaj vicprezidanto Je Gianjing faris funebran paroladon.

Post la fino de la funebra ceremonio, la cindrourno de kamarado Dong Bivu estis eskortita de kamaradoj Hua Guofeng, Vu De kaj aliaj al la Tombejo Babaŭŝan de Revoluciuloj kaj lokita tie.

Post la forpaso de kamarado Dong Bivu, la ĉefurbaj laboristoj, kamparanoj, kadroj de ŝtataj oficejoj, studentoj kaj komandantoj kaj batalantoj de la Ĉina Popola Liberiga Armeo kunvenis en la Kultura Palaco de Laborantaj Popolanoj por solene lin funebri. Kun respekto kaj malĝojo la kunvenantoj tributis silentan staradon al kamarado Dong Bivu antaŭ lia portreto kaj esprimis sian decidon lerni de kamarado Dong Bivu lian spiriton de kontinua revoluciado, persistado en la proleta revolucia linio de Prezidanto Maŭ kaj strebado por la granda celo de Komunismo.

Post la forpaso de kamarado Dong Bivu, reprezentantoj de frataj partioj, ambasadoroj de diversaj landoj al Ĉinio kaj fremdlandaj amikoj en Pekino iris al la Kultura Palaco de Laborantaj Popolanoj por solene kondolenci. La registaroj, parlamentoj kaj gvidantoj de multaj landoj kaj fremdlandaj amikoj alsendis telegramojn por esprimi sian kondolencon.




# Funebra Parolado de Vicprezidanto Je Gianjing

Kun plej granda malĝojo hodiaŭ ni funebras pri la morto de kamarado Dong Bivu, granda revolucia batalanto de la ĉina popolo, unu el la fondintoj de la Komunista Partio de Ĉinio kaj partia kaj ŝtata gvidanto amata de la tutlanda popolo.

La vivo de kamarado Dong Bivu estis tiu de persistado en daŭrigo de la revolucio. Li ĉiam restis firme lojala al la Partio, la popolo kaj la proleta revolucia linio de Prezidanto Maŭ. Dum la pasintaj pli ol 60 jaroj, li dediĉis sian tutan energion al la afero de liberigo de la ĉina popolo kaj la granda afero de komunismo. Sub la gvido de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, kamarado Dong Bivu faris neforgeseblajn kontribuojn al la fondo kaj disvolvo de la marksisma-leninisma Komunista Partio de Ĉinio, la renverso de la reakcia regado de imperiismo, feŭdismo kaj burokrata kapitalismo, la venko de la popola demokratia revolucio, la firmigo de la diktaturo de la proletaro kaj la disvolvo de la afero de socialisma revolucio kaj socialisma konstruado. Lia forpaso estas granda perdo de nia partio kaj nia tuta popolo kaj alportis profundan malĝojon al la tuta partio, la tuta armeo kaj la tuta popolo.

Frue jam en la komenco de tiu ĉi jarcento kamarado Dong Bivu aliĝis al Tongmenghuj gvidata de D-ro Sun Jatsen, partoprenis en la revolucio de 1911 kaj la revolucia batalo kontraŭ imperiismo kaj feŭdismo. En la batalado li akceptis Marksismon-Leninismon kaj fondis komunisman grupon en Hubej en 1920. Tiu estis unu el la unuaj marksismaj-leninismaj revoluciaj organizoj en Ĉinio. Kune kun kamarado Maŭ Zedong, li ĉeestis la Unuan Tutlandan Kongreson de la Komunista Partio de Ĉinio kaj fondis la Komunistan Partion de Ĉinio en 1921. Poste li revenis al Hubej kaj respondecis pri fondo kaj disvolvo de partiaj organizoj en Hubej-provinco. Li laboris kiel sekretario de la Loka Komitato de Vuhan de KPĈ kaj membro de la Partia Komitato de



*Solena ceremonio en Pekino por funebri pri kamarado Dong Bivu*




*En la halo de funebra ceremonio*

Hubej-provinco. Dum la agrara revolucia milito, li servis kiel estro de la Partia Lernejo sub la Centra Komitato de KPĈ, sekretario de la Komisiono de Partiaj Aferoj sub la Centra Komitato de KPĈ, membro de la Centra Plenuma Komitato de la Ĉina Soveto, prezidanto de la Plej Supera Juĝejo, vicprezidanto de la Laborista-Kamparana Prokurora Komitato en la Gianghi-a Centra Revolucia Bazloko, kaj okupiĝis pri konstruado de la Partio kaj ruĝa reĝimo. Li partoprenis en la Longa Marŝo de 25,000 Lioj en 1934. Post la atingo de la norda parto de Ŝenhi, li laboris kiel estro de la Partia Lernejo sub la Centra Komitato de KPĈ kaj aganta prezidanto de la Registaro de la Ŝenhi-Gansu-Ninghia-a Limregiono. Kiel unu el la reprezentantoj de nia Partio en la intertraktado kun Kuomintango dum la Kontraŭjapana Rezistmilito kaj post la kapitulaco de la japana imperiismo, li faris pinto-kontraŭ-pintan batalon kontraŭ la kontraŭrevolucia politiko de Kuomintango saboti la rezistmiliton, subfosi la unuiĝon kaj oponi kontraŭ la Komunista Partio kaj la popolo. Antaŭ la Liberiĝo de la lando, li servis kiel membro de la Sekretariejo de la Nordĉinia Buroo de la Centra Komitato de KPĈ, estro de la Financa kaj Ekonomia Komisiono de Norda Ĉinio kaj prezidanto de la Nordĉinia Popola Registaro. Post la Liberiĝo de la lando, li laboris kiel estro de la Centra Komisiono de Financo kaj Ekonomio, vicĉefministro de la Administra Konsilantaro de la Centra Popola Registaro, estro de la Komitato de Politikaj kaj Leĝaj Aferoj sub la Registara Administra Konsilantaro, prezidanto de la Plej Supera Popola Juĝejo, vicprezidanto de la Dua Tutlanda Komitato de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco, sekretario de la Kontrola Komisiono sub la Centra Komitato de KPĈ, vicprezidanto kaj aganta prezidanto de la Ĉina Popola Respubliko kaj vicprezidanto de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso. Li estis elektita kiel membro de la Centra Komitato en la Sesa, Sepa, Oka, Naŭa kaj Deka Tutlandaj Kongresoj de la Partio. Li estis membro de la Politika Buroo ekde la Sesa Plena Sesio de la

Sesa Centra Komitato de KPĈ kaj estis elektita kiel membro de la Konstanta Komitato de la Politika Buroo de la Centra Komitato de KPĈ en la Unua Plena Sesio de la Deka Centra Komitato de KPĈ. En la pasintaj jardekoj, kamarado Dong Bivu decideme plenumis kaj defendis la revolucian linion de Prezidanto Maŭ, kaj brave kaj senŝanceliĝe batalis en la popola demokratia revolucio kaj la socialisma revolucio, en la Granda Proleta Kultura Revolucio kaj la Movado de Kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio. Li starigis lernindan ekzemplon por ĉiuj kamaradoj de nia tuta Partio.

Funebrante pri la morto de kamarado Dong Bivu, ni devas lerni lian spiriton de kontinua revoluciado, persistado en senlaca kaj diligenta studo de verkoj de Marks, Engels, Lenin kaj Stalin kaj verkoj de Prezidanto Maŭ, persistado en la proleta revolucia linio de Prezidanto Maŭ, daŭrigo de la revolucio sub la diktaturo de la proletaro ĝis la fino kaj dediĉo de la tuta vivo al la batalo por la efektivigo de la granda celo de komunismo.

Ni devas lerni lian altan revolucian kvaliton kaj firman proletan partian spiriton de persistado en la partiaj principoj kaj la partia disciplino, defendo de la unuiĝo de la Partio kaj senlaca batalado kontraŭ ĉiuj agoj malutilaj al la interesoj de la Partio.

Ni devas lerni lian persistadon dum sia tuta vivo en la bona stilo de la proletaro, penema luktado en malfaciloj, tenado de intima interligo kun la amasoj, modesteco kaj prudenteco, afableco, severeco al si mem, donado de bona ekzemplo per sia agado kaj firma oponado kontraŭ burĝa vivstilo.

Ni devas lerni lian spiriton de tutkora servado al la popolo, dediĉo de sia ĉio al la revolucia afero sen konsidero pri siaj gajnoj kaj perdoj, kaj konscienca, energia kaj diligenta laborado ĝis sia morto. Prezidanto Maŭ diris: **"Ne estas malfacile por iu fari iom da bono. Malfacile estas fari bonon dum la tuta vivo"**. Kamarado Dong Bivu vere faris bonon dum la tuta vivo kaj meritas la nomon de proleta revoluciisto senlime fidela al la Partio kaj la popolo.

Kamarado Dong Bivu jam forlasis nin por ĉiam. Ni devas ŝanĝi nian malĝojon en forton kaj sub la gvido de la Centra Komitato de la Partio kun Prezidanto Maŭ kiel la estro serioze studi bone la teorion de la diktaturo de la proletaro, persisti en la fundamenta linio de la Partio, persisti en daŭrigo de la revolucio sub la diktaturo de la proletaro kaj batali por firmigi kaj fortigi la diktaturon de la proletaro kaj konstrui Ĉinion en potencan kaj modernan socialisman landon. Ni unuiĝu por gajni ankoraŭ pli grandajn venkojn!




*Kadroj de partiaj kaj ŝtataj institucioj, komandantoj kaj batalantoj de la Ĉina Popola Liberiga Armeo kaj popolanoj de la ĉefurbo funebras pri kamarado Dong Divu.*

# Eterne vivu en nia memoro granda proleta revoluciisto la ĉina popolo kamarado Dong



Kamarado Dong Bivu estas unu el la fondintoj de la Komunista Partio de Ĉinio. En longa revolucia batalado li faris neforgeseblan kontribuon por la Partio kaj la popolo.

# la
# de
# Bivu!



Foto de kamarado Dong Bivu en la norda Ŝenhi post la Longa Marŝo de 25,000 Lioj sub la gvido de Prezidanto Maŭ.




En aprilo de 1945, kamarado Dong Bivu ĉeestis, kiel reprezentanto de la ĉina liberigita regiono, kunvenon de internacia organizo de UN. Jen li subskribas la Ĉarton de la Unuiĝintaj Nacioj.



En la periodo de la Kontraŭjapana Rezistmilito kaj post la kapitulaco de la japana imperiismo, kamarado Dong Bivu faris, kiel unu el la reprezentantoj de nia Partio, pinto-kontraŭ-pintan bataladon en la intertraktado kun Kuomintango. La foto prezentas kamaradon Dong Bivu (la maldekstra) kaj kamaradon Vu Juĝang en Ĉongking.



En septembro de 1949, kamarado Dong Bivu faris paroladon en la Unua Plena Sesio de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco.



Kamarado Dong Bivu diligente kaj senlace studas verkojn de Marks, Engels, Lenin, Stalin kaj Prezidanto Maŭ kaj persistas en daŭrigo de la revolucio sub la diktaturo de la proletaro.



En novembro de 1956, kamarado Dong Bivu kore interparolis kun delegitoj kiuj ĉeestis la Tutlandan Kongreson de Aktiuloj el Martir- kaj Armean - familianoj, Invalidaj kaj Malmobilizitaj Armeanoj en Socialisma Konstruado.



Kamarado Dong Bivu kore manpremis kun komunumanoj dum inspekto al Bejta-brigado de la popola komunumo Ruĝa Floro de la urbo Jinĉuan de la Ninghia-a Huj-a Aŭtonoma Regiono en oktobro de 1963.


Frumatena sportado



# Aktiva Sporto de Infanoj



Iri al naĝado




Malgrandaj glacihokeistoj

Instruado





Knabinoj tre ŝatas salti sur kaŭĉuka ŝnuro.



Gimnastiko





Post la kursoj



Eniro

Sprita golulo



Kurkonkurso de tricikloj




Bela prezentado de gimnastiko



Amikeco la unua



Kolektiva gimnastiko





Penu'


HJU GUANG*:

# Vojo de Virina Liberigo de Ĉinio

KUN venko de la ĉina revolucio profunda ŝanĝiĝo okazis al la politika kaj ekonomia pozicioj de la vastaj virinaj amasoj. En nia lando laborantaj virinoj fariĝis mastroj de la ŝtato. Ni prenu kiel ekzemplon la Unuan Sesion de la Kvara Tutlanda Popola Kongreso de Ĉinio, okazigitan en la ĉijara januaro, en Pekino. La virinoj-reprezentantoj konsistigis pli ol 22% de la tuta reprezentantaro. Tiuj de Pekino konsistigis 25% de siaj reprezentantoj. Ili havas vastan reprezentantecon. Inter ili estis revoluciaj kadrinoj, laboristinoj, popolkomunumaninoj, ĈPLA-aninoj, milicaninoj, intelektaj junulinoj venintaj al montregionoj aŭ kamparo, verkistinoj, ĵurnalistinoj, sciencistinoj, kuracistinoj, inĝenierinoj, instruistinoj, aktorinoj, aviadistinoj, servistinoj, vendistinoj, sportistinoj k.a. En la Kongreso tri virinoj estis elektitaj kiel vicprezidantinoj de ĝia Konstanta Komitato kaj krome, unu virino estis nomumita kiel vicĉefministrino kaj du kiel ministrinoj.

Same kiel viroj, la virinoj de la nova Ĉinio diligente servas per sia saĝo kaj talento al la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado de la patrolando kaj ludas grandan rolon. Ili ĝuas egalajn rajtojn kiel viroj en politiko, ekonomio, kulturo, socio, familia vivo kaj aliaj flankoj.

Mi multjare okupiĝas pri virina laboro. En la malnova Ĉinio, la laborantaj virinoj estis suferplenaj. Ili ne nur suferis kiel viro subpremadon kaj ekspluatadon de eksterlandaj imperiistoj, enlandaj reakciaj registaroj, bienuloj kaj burĝaro, sed ankaŭ estis turmenti-



*Vang Dongmej, juna estro de la lokomotiva grupo La Oka de Marto de la Transporta Sekcio de la Anŝan-a Ferŝtala Kompanio*

taj de konfucianismo kiel "viroj estas noblaj, dum virinoj plebaj" dum pli ol du mil jaroj. La virinoj ne nur ne havis rajton partopreni en politika kaj socia aktivadoj, sed ankaŭ sin trovis en sklava pozicio en sia familio. Kompare kun la pasinteco, hodiaŭ vere estas kvazaŭ paradizo. Kial okazis tiel granda ŝanĝiĝo al la pozicio de virinoj en la nova socio? Laŭ miaj propraj spertoj, mi profunde konis, ke la plej fundamenta kaŭzo kuŝas en tio ke sub la gvido de Prezidanto Maŭ Zedong kaj la Komunista Partio de Ĉinio la vastaj virinaj amasoj kaj aliaj popoloj de nia lando ĵetis sin en longtempan revolucian batalon, starigis la diktaturon de la proletaro kaj nun persistas en daŭrigo de la revolucio sub la proletara diktaturo. Nur dank' al tio la virina movado de Ĉinio iris de venko al venko kaj la ĉinaj virinoj havigis al si hodiaŭan pozicion.

**KIAL VIRINOJ SUFERIS SUBPREMADON?**

En la longaj jaroj de la malnova Ĉinio, iuj progresemaj virinoj faris diversajn klopodojn por respondi tiun demandon kaj serĉi vojon de virina liberigo. Kaj parto de virinaj laborantoj iam klopodis por gajni virinajn rajton kaj pozicion startante sole de la t. n. virina problemo, sed akiris neniun sukceson. El sia zigzaga vojo, la ĉinaj virinoj komprenis ke la virina movado estas konsistiga parto de la tuta revolucia movado, kaj ke por gajni liberigon de la virinoj, oni devas antaŭ ĉio mobilizi virinojn al revolucio kaj batalo por sendependiĝo de la nacio kaj por socialismo.

Mi komencis fari virinajn laborojn en la jaro 1937, kaj tiam mia tasko estis organizi kamparajn virinojn por partopreni en la nacisava movado kontraŭ la japanaj agresantoj. Kiel studentino antaŭ partopreno en la laboro, mi komprenis nemulton pri revolucia teorio je la komenco. Kvankam mi komprenis ke laborantaj virinoj konsistigis plejparton de la virinoj, kaj ke sen ilia liberiĝo la virina liberigo restis nur trompo de ekspluatantaj klasoj kaj iluzio de intelektuloj, tamen kiel liberigi ilin mi ne klare sciis. En kamparo, mi vidis ke laborantaj virinoj sin trovis



*Sekretariino de la gubernia komitato de KPĈ Lju Mejjing ekzamenas kotonplantidojn surkampe.*

en sufera abismo, kaj ofte aperis en mia kapo la problemoj: Kial virinoj suferas subpremadon? Kial la viroj kaj la virinoj estas neegalaj en rajtoj? Kiel virinoj povas akiri liberiĝon? Komence, mi opiniis ke virinoj suferis submetadon ĉefe de siaj edzo kaj bogepatroj, por akiri egalan rajtecon ili devas fari batalon kontraŭ ili. Tian eraran penson havis siatempe ankaŭ iuj virinoj kaj virinaj laborantinoj.

Dank' al lernado de verkoj de Marks, Lenin kaj Prezidanto Maŭ kaj batala praktiko, mi iom post iom komprenis, ke la socia radiko de suferoj de la virinoj estas privata posedsistemo kaj klasa subpremado. Por ĝisfunde ŝanĝi la neegalan staton de la laborantaj virinoj oni devas elimini privatan posedsistemon kaj ekspluatantan klason per revolucio. Ĝuste pro tio, la granda tasko ĝisfunde liberigi virinojn nature falis sur la ŝultrojn de la proletaro, kiu prenas eliminon de privata posedsistemo kaj klasa ekspluatado kiel sian historian taskon, tiel ke ĝi fariĝis unu el la konsistigaj partoj de la proleta revolucio. Estas tre erara la burĝa virina movado, kiu sin apartigas de klasoj, klasbataloj kaj la proleta revolucio, kaj ĉasas "egalrajtecon de viroj kaj virinoj" nur en formo, pro tio ĝi neeviteble kondukos la virinan liberigan movadon al erara vojo.

La granda gvidanto de la ĉina popolo Prezidanto Maŭ montris unikan ĝustan vojon ne nur por la ĉina revolucio, sed ankaŭ por la kompleta liberigo de la ĉinaj virinoj. En la jaro 1927, Prezidanto Maŭ diris en sia *Raporto pri Esplorado de la Kamparana Movado en Hunan:* **"Viroj en Ĉinio ordinare estas submetitaj al la dominado de tri sistemigitaj aŭtoritatoj politika, klana kaj religia. Rilate al virinoj, ili estas metitaj ankaŭ sub la dominado de la viro (la edza aŭtoritato)." "La politika aŭtoritato de la bienuloj estas la spino de ĉiuj ceteraj aŭtoritatoj. Ĉar ĝi estas jam renversita, sekve la klana aŭtoritato, la religia aŭtoritato kaj la edza aŭtoritato ĉiuj komencis ŝanceliĝi." "Rilate al la klanismo, superstiĉo kaj malegaleco inter la viroj kaj virinoj, ilia abolo estos natura konsekvenco de venko en la politika kaj ekonomia bataloj."** Tio profunde klarigis la rilaton inter la virina liberigo kaj la revolucia batalo de la ĉina popolo. Nur se oni renversos dominadon de reakcia politika aŭtoritato kaj subpremadon de eksterlandaj agresaj fortoj kaj efektivigos la diktaturon de la proletaro, oni povos radikale ŝanĝi la virinan pozicion.



*Kuracistino servas al nacimalplimultoj en kamparo de Guanghi.*

Ĉu ne tiel estis la tiama socia efektiva situacio? En kamparo same kiel viroj la malriĉkamparaninoj kaj malsuperaj mezkamparaninoj suferis kruelajn ekspluatadon kaj subpremadon de bienula klaso, kaj en urbo, laboristoj ĉu viraj aŭ virinaj kaj iliaj familianoj ĉiuj suferis tiun de kapitalistoj. Aliflanke, la edzinoj de bienuloj kaj kapitalistoj subpremis laborantajn popolanojn helpante siajn edzojn. Kvankam ilia pozicio estis iom pli mal-

alta ol tiu de samklasaj viroj, tamen tio estis nur la diferenco interne de la ekspluatantaj klasoj. Ĉu ne estis absurde en tia situacio, se oni postulis la laborantajn virinojn fari batalon kontraŭ siaj samklasaj viroj, anstataŭ mobilizi ilin al la revolucia batalo por renversi ekspluatantan klason? Kompreneble, interne de la laborantaj popoloj troviĝis ideologia restaĵo de ekspluatantaj klasoj "tro taksi virojn sed malestimi virinojn" pro influo de konfucianismo, tio devas esti solvita per persvada kaj eduka metodoj, sed absolute ne estas radika problemo de la virina liberigo.

### VOJO DE LA VIRINA LIBERIGO

Por akiri sian liberiĝon la vastaj virinaj amasoj nepre devas ĵeti sin en la proletan revolucion, kaj por akiri sian venkon la proleta revolucio nepre ne devas sin apartigi de la vastaj virinaj amasoj. Marks diris: **"Ĉiu ajn, kiu havas iom da scio pri historio, scias, ke sen virina fermento ne povas esti grandaj sociaj transformoj."** Ankaŭ Lenin diris: **"Ne povas esti socialisma revolucio, se la vasta amaso de laborantaj virinoj ne aktive partoprenas en ĝi."** Ankaŭ Prezidanto Maŭ iam diris: **"Virinoj okupas duonon de la loĝantaro. La ekonomia pozicio de la laborantaj virinoj kaj ilia stato esti aparte subpremataj pruvis ke virinoj ne nur urĝe bezonas la revolucion sed ankaŭ estas unu el la fortoj decidantaj ĝian venkon."**

*Traktoristino de arbohaka taĉmento en kolektado de ligno*



En diversaj historiaj periodoj de la revolucio de nia lando, la vastaj amasoj de laborantaj virinoj aktive ĵetis sin en revoluciaj bataloj. Ekzemple, en 1934-1935, en la vicaro de la fame konata Longa Marŝo de 25,000 Lioj de la ĉina Laborista-Kamparana Ruĝa Armeo, troviĝis nemalmultaj progresemaj virinoj. Ili same kiel viroj, firmaj kaj kuraĝaj, grimpinte neĝmonton kaj trapasinte stepon, venkis neimageblajn malfacilojn kaj triumfe atingis la cellokon. Nun multaj el ili fariĝis eminentaj kadrinoj de la Partio.

En la periodo de la Kontraŭjapana Rezistmilito (1937-1945), mi laboris sinsekve en kelkaj postfrontaj bazlokoj de Hebej-provinco. Restis ankoraŭ freŝaj en mia memoro la scenoj. Kiel la virinoj aktive partoprenis siatempe en la Kontraŭjapana Rezistmilito. Tiam nemalmultaj virinoj konsilis siajn edzon kaj filojn aliĝi al la armeo, kaj post ties foriro ili prenis sur sin la tutan agrikulturan produktan taskon. Krome ili por la popola armeo teksis ŝtofojn, faris ŝuojn, vektoportis brankardojn, flegis vunditojn kaj malsanulojn kaj transportis informojn. Iuj virinoj eĉ prenis pafilon kaj rekte partoprenis en la armita batalo kontraŭ la japanaj agresantoj. En la periodo de la Liberiga Milito (1946-1949) la vasta amaso de laborantaj virinoj aktive helpis fronton por faligi Ĉiangkajŝekajn reakciulojn. Ili ankaŭ partoprenis en la agrara reformo kaj aliaj amasaj revoluciaj bataloj kaj per tio ludis grandan nemankigeblan rolon. En la historio de la ĉina revolucio, aperis multaj heroinoj, kaj iliaj heroaĵoj nun ankoraŭ estas laŭdataj.

En la periodo de la revolucia milito, kun venka disvolviĝo de la revolucia batalo, senĉese altiĝis la virina pozicio en suda parto de Hebej-provinco. La virinoj preskaŭ ĉiuj

*Kun zorgemo*



faris revolucian laboron, kaj pli kaj pli multaj el ili laboris kiel gvidantinoj, ekzemple vilaĝestrino, distriktestrino, gubernietrino k.a. Tio estis neimagebla en la pasinteco. Vidinte tiun rimarkindan ŝanĝiĝon de la virina pozicio, mi, kiel virina kadrino, estis tre emociita siatempe.

## RADIKA ŜANĜIĜO DE LA VIRINA POZICIO

Ĝuste dank' al revolucia batalo, kun aktiva partopreno de la tutlanda popolo inkluzive de centoj da milionoj da virinoj oni fine renversis en 1949 la malnovan obskuran regadon de imperiismo, feŭdismo kaj burokrata kapitalismo en nia lando. Liberiĝis la ĉina popolo inkluzive de la vastaj virinaj amasoj.

Post la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko, la laboranta popolo fariĝis mastro de la ŝtato. La Partio kaj la registaro ellaboris konstitucion, leĝon kaj aliajn politikojn, kiuj garantias kaj akcelas, ke virinoj ĝuu egalajn rajtojn kiel viroj en politiko, ekonomio, kulturo, socia kaj familia vivoj kaj aliaj flankoj. Ekzemple, la edzeca leĝo publikigita en la jaro 1950, ĝisfunde abolis la feŭdan negocan edzecan sistemon kaj efektivigis liberan edzecon de viroj kaj virinoj anstataŭ tiun deciditan de la gepatroj. En "Laborasekura Regularo" publikigita en la jaro 1951, estas specialaj artikoloj pri protekto de virinoj k.a.

Sed la revolucio ne finiĝis. En la jaro 1949, kiam fondiĝis la Ĉina Popola Respubliko, Prezidanto Maŭ alvokis la tutlandajn virinojn: **"Unuiĝu kaj partoprenu en produktado kaj politika aktivado por plibonigi la ekonomian kaj politikan staton de virinoj."** Kiam nia lando eniris en la socialisman revolucian periodon, Prezidanto Maŭ ankaŭ instruis nin: **"La vera egaleco inter la viroj kaj virinoj povas esti realigita nur en la procezo de la socialisma transformo de la tuta socio."**

Sub la direktado de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ, la vastaj virinaj amasoj de nia lando daŭre marŝas antaŭen. Ili aktive partoprenas en diversaj politikaj movadoj kaj la socialisma revolucio. Precipe en la Granda Proleta Kultura Revolucio, ili kune kun aliaj



*Olekolektistinoj de Daking-olekampo atentemaj en laboro*

popolanoj de la tuta lando ĵetis sin en la bataladon por frakasi la du burĝajn stabojn kun Liu Ŝaŭki kaj Lin Biaŭ kiel ĉefoj. En la batalado, ili diligente lernis Marksismon-Leninismon-Maŭzedongpenson kaj multe levis sian konscion pri klasbatalo kaj la batalo inter la du linioj. Ili zorgas gravajn aferojn de la ŝtato kaj la mondo, tutkore servas al la popolo, ligante sian laboron kun la socialisma konstruado kaj liberiga afero de la tutmondaj virinoj kaj la tuta homaro. Granda nombro da eminentaj virinoj fariĝis membroj de la Komunista Partio de Ĉinio.

Rapida disvolviĝo de la socialisma konstruado de ekonomio kaj kulturo de diversaj flankoj havigis ŝancojn al virinoj de nia lando partopreni en socia produkta laboro. En ĉiuj urboj multaj virinoj eliris el hejmoj por partopreni en la socialisma konstruado. Nun en la urbo Pekino troviĝas 700,000 laboristinoj kaj oficistinoj, kiuj konsistigis ĉ. 40% de la tuta urba laboristaro kaj oficistaro. En kamparo de la tuta lando, la vastaj amasoj de virinoj inkluzive milionojn da intelektaj junulinoj venintaj al montregionoj kaj kamparo, kun plena vigleco transformas la naturon por konstrui novan socialisman kamparon. En la lastaj jaroj, aperis granda nombro da nudpiedaj kuracistinoj, kio multe ŝanĝas postiĝintan fizionomion de kuracado kaj higieno de la kamparo. Ankaŭ multegaj virinoj diligente laboras por socialismo en eduka, kultura, arta, scienca kaj aliaj kampoj. Ĉio ĉi tio pruvis: La epoko ŝanĝiĝis, la viroj kaj la virinoj estas tute egalaj kaj kion la viroj povas fari, tion povas ankaŭ la virinoj.

En la diversaj lokoj de nia lando, oni pli kaj pli multe starigis komunajn manĝejojn, infanvartejojn, infanĝardenojn kaj aliajn virinajn kaj infanajn servojn, disvastigas laŭplanan infannaskon kaj pledas por tio ke geedzoj kune plenumu hejmajn laborojn. Tio ne nur garantiis sanon de virinoj, sed ankaŭ kreis favorajn kondiĉojn por ke virinoj sin liberigu el pezaj hejmaj laboroj kaj pli bone partoprenu en diversaj politikaj aktivadoj kaj produktaj laboroj.

Estas aparte menciinde, ke post la Liberiĝo, precipe de la Granda Proleta Kultura Revolucio, granda nombro da eminentaj laboristinoj kaj kamparaninoj en nia lando estis promociitaj kiel gvidantoj de la plej alta nivelo de la Partio kaj registaro, la Centra Komitato de la Partio kaj la Tutlanda Popola Kongreso, ĝis diversnivelaj lokaj oficejoj, fabrikoj kaj popolaj komunumoj. Ordinara tekstila laboristino fariĝis gvidantino de la Partio kaj la ŝtato, kaj antaŭa tibeta servutulino nun fariĝis estimata gvidanta kadrino. Ili strikte ligiĝas kun la amasoj, diligente servas al la popolo kaj ludas ĉiam pli grandan rolon. La apero de miloj kaj dekmiloj da virinaj kadroj estas grava signo de virina liberigo de nia lando.

Por ĉiam forpasis jam la historio, en kiu la vasta amaso de niaj virinoj suferis sklavadon kaj subpremadon de miloj da jaroj. La fondiĝo de la socialisma sistemo de Ĉinio kreis senlime vastan perspektivon por ĝisfunda liberiĝo de virinoj de nia lando.

---

* *La aŭtorino estas vicestrino de la Virina Ligo de Pekino.*

# Virinoj de la nova Ĉinio sur diversaj frontoj



Knabinoj partoprenantaj en la konstruado de Sangiaŭkoŭ-akvorezervejo en Henan-provinco



Ĝaŭ Ĉunlan (la maldekstra), kompartianino kaj veterana laboristino de la Dua Kotona Ŝpinteksejo de Ĝenggôŭ entuziasme helpas junan laboristinon.





Laboristinoj sur la fiŝŝipo "La Oka de Marto" de Ĝangzi-komunumo de Ĉanghaj-gubernio, Liaŭning-provinco.

Jang Feng (la dua de maldekstre), sekretario de la partia filio de Nanjaŭŝan-brigado de Jaŭhian-gubernio, Hebej-provinco, studas kune kun komunumanoj.



ilicaninoj interpa-
las pri la bonega
tuacio en- kaj eks-
rlanda.





an Hiuhua, naturgasa laboristino de surmara tobora taĉmento de la petrolkampo Dagang



Pilotino de la aera armeo de la Ĉina Popola Liberiga Armeo



Sikin, kuracistino
mongola nacie
survoje al pacien



Amatora virina korbopilka teamo en kamparo de Kujhu-komunumo de Nanling-gubernio, Anhuj-provinco



Agronomia esplora grupo "La Oka de Marto" el ĝuang-oj de Dukang-komunumo de Guanghi en selektado de rizo



Kamparanino-pentristino Li Fenglan de la gubernio Huhian, Ŝenhi-provinco, kreas novan verkon.

# Virinoj sur Gvidaj Postenoj

## — Pri aktivadoj de kadrinoj de Linhi-gubernio

DE post la komenco de la Granda Proleta Kultura Revolucio multaj virinoj en la gubernio Linhi de Hebej-provinco fariĝis gvidantoj de diversaj niveloj. La unua sekretario de la gubernia komitato de la Komunista Partio de Ĉinio estas kamaradino Lju Julan, membro de la Centra Komitato de KPĈ. Ankaŭ alia sekretario de la komitato Jang Ajlian estas virino. Inter la ĉefaj gvidantoj de la oficejoj dependaj rekte de la gubernia revolucia komitato estas 15 virinoj. En la gubernio 17 virinoj laboras kiel sekretario aŭ vicsekretario de komunuma partia komitato, inter ili du estas vicsekretarioj kumulantaj la oficon de gvidanto de la fako de komunuma popola armado. Inter la sekretarioj kaj vicsekretarioj de la brigadoj de la gubernio estas 164 virinoj. En la lastaj 8 jaroj la gubernio kulturis kaj promociis 1,926 virinojn al gvidaj oficoj, kiuj konsistigas 53% de la tuta kadraro nove promociita. Tiuj kadrinoj pliviglis la gvidantarojn de diversaj niveloj kaj efike akcelis la pli profundan disvolvon de la amasa movado de lerno de Daĝaj en agrikulturo.

I

Parolante pri la ŝanĝiĝo de Linhi-gubernio, oni senescepte laŭdas Lju Julan, la sekretarion de la gubernia partia komitato, ke ŝi estas bona gvidanto.

En 1955, diplomite de elementa lernejo, Lju Julan revenis al sia hejmvilaĝo Dongliuŝangu por fariĝi kamparanino. En sia aĝo de 15 jaroj ŝi fariĝis estro de elementa kooperativo de agrikultura produktado. Kiam ŝi estis 19-jara, ŝi fariĝis sekretario de la brigada partia filio. Post dekkelkjara klopodado, ŝi,



*Kadrinoj en interkonsiliĝo*

la kadroj kaj amasoj kune ŝanĝis la malriĉan sablozan vilaĝon Dongliuŝangu en novan socialisman vilaĝon: Ĝia pohektara produktokvanto de greno dekobliĝis, kaj tiu de sensemigita kotono superis 750 kg. En 1971 Lju Julan fariĝis la unua sekretario de la gubernia partia komitato. Ŝi dufoje vizitis la gubernion Hijang, kiu jam fariĝis Daĝaj-tipa gubernio, kaj modeste lernis de ĝi avangardan sperton en plenumo de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ.

Reveninte al sia hejmloko, Lju Julan raportis al la gubernia partia komitato kion ŝi vidis kaj aŭdis en Hijang. Ŝi akre demandis: Kian rilaton la malrapida disvolviĝo de la agrikulturo de Linhi-gubernio havas kun la penso kaj laborstilo de niaj kadroj? Kian rolon la kadroj devas ludi, kiam la Partio alvokas ke oni tutforte disvolvu agrikulturon? Kiel oni povas pli bone plenumi la revolucian linion kaj politikojn de Prezidanto Maŭ? La demandoj forte skuis la gvidantojn de la gubernio. Ili analizis la realan staton, resumis sperton kaj lecionon kaj vidis ke partopreno de kadroj en kolektiva produkta laborado estas grava garantio por plenumi la revolucian linion de Prezidanto Maŭ. Sekve la gubernia partia komitato alvokis la kadrojn de diversaj niveloj, ke ili iru en la kamparon por partopreni en agrikultura produktado, kaj la ĉefaj gvidantoj de la gubernio donis ekzemplon per sia konduto.

En aprilo de 1972 kamaradino Lju Julan venis al Donghe-brigado por labori tie. Ĉi tie la kondiĉoj de produktado estis malfavoraj kaj la klasbatalo estis komplika, kaj pro tio la brigado restis postiĝinta. Demetinte la pakaĵon, ŝi tuj iris al kampo kaj sarkis kune kun komunumanoj. En vespero ŝi vizitis iliajn domojn kaj babiladis kun ili pri la produkto kaj la stato de la brigado. En la vivado inter la amasoj ŝi trovis la kaŭzon de la postiĝinteco: al la kadroj de la brigado mankis harmonio pro incito de malbonuloj.

Koninte la staton de la brigado, Lju Julan unue faris al la kadroj kaj amasoj linian edukadon por altigi ilian konscion pri la klasbatalo kaj batalo inter la du linioj, akcentante



*Ĝang Ĉunting, milicestrino de la komunumo lekcias por milicanoj pri milita tekniko.*

la damaĝon de malakordo kaj gravecon de revolucia unuiĝo. Post altiĝo de la politika konscio la kadroj malkovris kaj batis la subfosadon de klasaj malamikoj malpacigantaj la kadrojn. Poste, Lju Julan interkonsiliĝis kun la kadroj kaj komunumanoj por ellabori planon por ŝanĝi la fizionomion de la produktado, difini aranĝojn por efektivigi pliproduktón kaj disvastigi progresajn teknikojn, kaj efike ŝanĝi la produktajn kondiĉojn sin apogante sur la propraj fortoj kaj pene luktante en malfaciloj. En tiu jaro la brigado ebenigis ĉiujn ondajn kampojn, boris 4 profundajn maŝinputojn kaj fosis irigacian kanalon kun longeco de pli ol 1,850 metroj, per kiu ĝi alkondukis akvon de Vejhe-rivero kaj turnis parton de la agro en irigaciatajn kampojn. La komunumanoj ĝoje diris: "Lju Julan laboris en nia brigado nur unu jaron, sed ŝi efektivigis kion ni iam deziris sed ne sukcesis fari."

La sukceso de Lju Julan en tiu postiĝinta brigado multe edifis la aliajn gvidantojn en la gubernio. Escepte de kelkaj kadroj, kiuj restas en la oficejoj por prizorgi ĉiutagan laboron, la membroj de la konstanta komitato de la gubernia partia komitato kaj la gvidantoj de la partiaj komitatoj de la 15 komunumoj ĉiuj iris en bazajn unuojn por fari samtempe laboron kaj enketadon, resumi kaj disvastigi bonan sperton por direkti la revolucion kaj produktadon de la tuta gubernio. Tio multe progresigis la laboron de la tuta gubernio.

II

Fariĝinte la unua sekretario de la gubernia partia komitato, kamaradino Lju Julan multe zorgas pri la virina laboro kaj prenas kulturon kaj elektadon de kadrinoj kiel gravan punkton en la tagordo de la gubernia partia komitato. Dank' al la helpo de gvidantoj kaj hardo en amasa batalo, aperis granda nombro da aktivulinoj, inter kiuj troviĝas kamaradino Jang Ajlian. Antaŭe ŝi estis vicsekretario de la partia filio de la brigado Bejhingjuan. Per kvarjara klopodo ŝi kaj la aliaj brigadaj



*Lju Julan (la maldekstra) kaj Jang Ajlian*

kadroj kaj la amasoj kreis pli ol 20 hektarojn da kampoj pleniginte 8 grandajn fosojn kaj 6 grandajn kavojn kaj transformis pli ol 200 hektarojn da kampoj de la brigado en irigaciatajn kampojn. En 1970 Jang Ajlian organizis virinan putoboran grupon. Dank' al la penema luktado ŝia brigado antaŭe postiĝinta fariĝis avangarda brigado de la tuta gubernio en lerno de Daĝaj en agrikulturo.

En 1973 Jang Ajlian estis sendita al Hiabusi-komunumo kiel sekretario de ĝia partia komitato. Tiu komunumo konsistis el 30 produktaj brigadoj kun pli ol 20,000 loĝantoj kaj pli ol 4,000 hektaroj da kampoj. Jang Ajlian estas tre okupata. Sed malgraŭ tio ŝi konstante kaptis ĉiun ŝancon por studi. Ŝi diris kun profunda kompreno: "Estante kadro oni devas diligente studi. Sen studo oni havas nek direkton en ago, nek kapablon en konado, nek rimedojn en laboro, nek armilojn en batalo." En la lastaj jaroj ŝi tralegis la kvar

volumojn de elektitaj verkoj de Prezidanto Maŭ, *Manifesto de la Komunista Partio*, *Materiismo kaj Empiriokritikismo* kaj aliajn marksismajn-leninismajn verkojn kaj faris notojn. Dank' al studado de la verkoj senĉese altiĝas ŝia teoria nivelo de Marksismo-Leninismo kaj ŝia konscienco en plenumo de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ. Ŝi persistas en la principo de kombino de teorio kun praktiko prenante la lastan kiel la unuan, ĉiam staras en la unua vico en la tri grandaj revoluciaj movadoj estante kaj komandanto kaj batalanto. Por ŝanĝi la fizionomion de la komunumo ŝi pene laboras kune kun la kadroj kaj komunumanoj.

En majo de 1973, kamaradino Jang Ajlian rimarkis, ke en la 1,500 hektaroj da sorgokampoj multaj pecetoj estas sen plantaĵoj. Ŝi rememoris la sperton de la brigado Dongliuŝangu: En 1972 tiu brigado faris racie densan semadon plene utiligante ĉiun terpeceton kaj akiris bonegan rikolton en tre seka jaro. Ŝi proponis al la komunuma partia komitato ke oni tuj plenigu la vakantajn lokojn per plantaĵoj. Iuj opiniis ke la tasko estas tro granda kaj malfacile plenumebla. Jang Ajlian diris: "Nur granda klopodo povas konduki al granda ŝanĝo. Ni povas rapide disvastigi la bonan sperton de plena utiligo de la kampoj, se nur ni gvidantoj havas la kuraĝon fari decidon, timi nek malfacilojn nek penadon."

Dirite, farite. Sub la gvido de Jang Ajlian la komunumaj kadroj iris en 10 brigadojn, kontrolis ĉiujn kampojn, konis la pensojn de la kadroj kaj komunumanoj, faris pensan kaj politikan laboron kaj helpis la produktajn grupojn ellabori planojn de plenigo de vakantaj lokoj per plantaĵoj laŭ iliaj propraj kondiĉoj. En tiuj tagoj Jang Ajlian ĉiutage iris labori en kampo antaŭ la tagiĝo kaj hejmenrevenis sub la luno. Ili klopodis dekkelkajn tagojn kaj plenigis ĉiujn vakantajn pecojn en la kampoj per sorgaj plantaĵoj. La areo de aldonitaj plantaĵoj superis 500 hektarojn.

Post tio Jang Ajlian laboris 50 sinsekvajn tagojn kune kun la kadroj kaj amasoj por sarkado, insektoekstermado, drenado kaj sterkado. En tiu periodo ŝi dormis ĉiutage nur mallongan tempon kaj malgrasiĝis pro penado. Oni konsilis al ŝi ripozi, sed ŝi diris: "Tio ne gravas. Por konstrui socialismon ĉiuj penoj estas dolĉaj."

Sub la gvido de Jang Ajlian la komunuma partia komitato serioze plenumas la bazan linion de la Partio, ordigis la gvidantaron de la postiĝintaj brigadoj, altigis la socialisman konscion de la kadroj kaj komunumanoj kaj forte batis kapitalismajn tendencojn. Dank' al tio la hektara produktokvanto de greno de la komunumo kreskis de 2.12 tunoj ĝis 3.57. La komunumo Hiabusi rapide fariĝis avangarda unuo de la gubernio en lerno de Daĝaj en agrikulturo.

En la pasinta jaro la 25-jara Jang Ajlian estis promociita al la posteno de sekretario de la gubernia partia komitato. Ŝi estas pli diligenta en lernado de marksismaj-leninismaj verkoj por altigi la nivelon de sia penso kaj teorio. Ŝi ofte laboris ĝis profunda nokto. Ŝi kaj la aliaj gvidantoj de la komitato persone pririgardis kaj elektadis la liniojn de kanaloj, vizitis maljunajn malriĉkamparanojn kaj ellaboris perspektivan planon por transformi alkalan teron, batali kontraŭ sekeco kaj akvostagneco kaj starigi irigacian sistemon. Ili decidis kiel eble plej rapide ŝanĝi la fizionomion de Linhi-gubernio.

Lju Julan kaj Jang Ajlian donis bonan ekzemplon por la virinoj de la tuta gubernio.

## III

Sub la edifo de la kadrinoj, la virinoj de la tuta gubernio forigis de si la memmalestimon kaj firmigis la memfidon. Ili liberigis sin el la kateno de malnovaj pensoj kaj tradicioj kaj ludas pli kaj pli gravan rolon kaj en revolucio kaj en produktado.

En longa tempo la agrikulturo de Linhigubernio estis damaĝita ĉefe de sekeco kaj alkaleco. En vintro de 1972 kamaradino Lju Julan mobilizis pli ol 500 kadrojn kaj pli ol 30,000 komunumanojn al fosado de la kanalo Juegin. En 13 tagoj ili finis la fosadon de kanalo longa je 28 kilometroj. Per tio oni

ŝanĝis pli ol 6,600 hektarojn da kampoj en irigaciatajn. Tiu sukceso liberigis la penson de la homoj. Antaŭe la virinoj estis malpermesataj partopreni en fosado de puto aŭ kanalo, eĉ iuj virinoj mem opiniis, ke "virinoj ne taŭgas por tio". Nun tiu opinio estas ŝanĝita kaj la limigo estas rompita.

Por pli frue starigi kompletan irigacian sistemon en la gubernio, la virinoj sinsekve organizis sin en virinajn putoborajn grupojn. Antaŭ la Granda Proleta Kultura Revolucio troviĝis nur du maŝinputoj en la gubernio, dank' al la laboro de la virinoj nun ĝi havas 3,500 maŝinputojn, 26 pumpstaciojn kaj 24 ĉefajn irigaciajn kanalojn. La irigaciataj kampoj konsistigas 74% de la tuta agraro de la gubernio. Ilia klopodo multe bonigis la kondiĉojn de produktado kaj forte akcelis la disvolviĝon de la agrikulturo. En 1974 la grena produktokvanto duobliĝis kompare kun tiu en 1965.

La virinoj de Linhi-gubernio faris kontribuon same kiel la viroj ne nur en la konstruado de irigacia sistemo, sed ankaŭ en scienca terkulturado. Nun en la gubernio fondiĝis pli ol 1,130 virinaj kotonkulturaj grupoj. Ili modeste lernis de aliaj lokoj bonan sperton, zorge faris kampajn laborojn kaj okulfrape grandigis la kotonan produktokvanton. En Hiaŭma-vilaĝo troviĝas virina kotonkultura grupo gvidata de komunistino Ĝaŭ Juĝu. La grupo aplikis progresan sperton, plifruigis la kotonan semadon kaj rikoltis 1,882 kg. da sensemigita kotono po hektaro. Tio estas duoblo de la kotona produktokvanto de aliaj kampoj. La komunumanoj ĝoje diris: "Ni neniam akiris tiel bonan rikolton de kotono. Tion ni devas danki al la junulinoj!"

La virinoj de Linhi-gubernio ne nur entuziasme partoprenas en produktado, sed ankaŭ en batalo de ideologia kampo. Ili decidis okupi per socialismo la pensan kaj kulturan fronton en la kamparo. Ĉiuj brigadoj de la gubernio fondis vesperan politikan lernejon, en kiu partoprenas ankaŭ multaj virinoj. Sun Suhua, vicestro de la virina asocio de la brigado Dongliuŝangu organizis virinan propagandan grupon, kiu mem verkis programerojn ŝatatajn de la amasoj por kritiki Lin Biaŭ kaj Konfucion. Ili faris prezentadon en vespero aŭ dum paŭzo en kamplaboro. Pro la zorgo de la partiaj komitatoj de diversaj niveloj 1,972 virinoj de la gubernio aliĝis al la vicaro de marksisma teorio. La virinaj amasoj fariĝis aktiva forto en la revolucio de superstrukturo.



*Jang Ajlian (la unua de maldekstre) interparolas kun la kadrinoj de Bejhinjuan-brigado.*

Por pli bone labori, la kadrinoj memkonscie malfruigis sian edziniĝon kaj planis la naskon. Ili ĉiuj estas energiplenaj en la tri grandaj revoluciaj movadoj. Influate de ili, junulinoj malfruigis sian edziniĝon kaj la edziniĝintaj aplikis naskoplanon. Tio jam fariĝis bona moro. Krome ili pledas por tio, ke ankaŭ viroj devas prizorgi mastrumadon kaj oni devas efektivigi la politikon de egala pago por egala laboro de viroj kaj virinoj. Nun en la gubernio pli ol 90% de la laborkapablaj virinoj partoprenas en kampa laboro. Inter ili aperis nombro da eminentaj traktoristinoj, dizelistinoj, bredistinoj, teknikistinoj, elektristinoj k. a., kiuj ludas indan rolon sur la respektiva laborposteno.

BIAN VEN:

# Granda Rolo Ludata de Virinoj en Nia Konstruado

La virinoj de la nova Ĉinio ludas pli kaj pli grandan rolon en diversaj frontoj de la socialisma konstruado. Prezidanto Maŭ Zedong iam montris: **"La epoko ŝanĝiĝis, kaj la viroj kaj virinoj ĉiuj estas egalaj. Kion la viroj povas fari, tion ankaŭ la virinoj povas fari."** Observante tiun ĉi instrukcion de Prezidanto Maŭ, la virinoj de nia lando aktive sin ĵetis en la novan altan tajdon de socialisma konstruado kaj akiris elstarajn sukcesojn.

## LOKOMOTIVISTINOJ

Fajfas la lokomotivo, kaj ruliĝas la radoj de la trajno. Antaŭ la manipulstablo de stirejo, sidas du junulinoj, kiuj zorgeme stiras la 14-an Ekspreson de Ŝanhajo ĝis Pekino tiratan de dizela lokomotivo fabrikita de nia lando mem. Ili estas membroj de lokomotivistina grupo de la ŝanhaja lokomotiva administracio. El la 15 lokomotivistinoj de la nomita grupo, 13 estas intelektaj junulinoj ĵus diplomiĝintaj el mezlernejo.

Tuj je sia fondiĝo en novembro de 1973 la grupo jam ricevis varman subtenon de la partia komitato kaj la laboristoj kaj oficistoj de la nomita lokomotiva administracio. Sub influo de malnova tradicia ideologio kiel "viroj estas noblaj dum virinoj plebaj" kaŭzita de konfucianismo kaj feŭda regado en kelkmil jaroj, iuj dubis ĉu virinoj povas stiri lokomotivon, dirante: "Ilia nuna entuziasmo daŭros nelonge." Ĝuste tiam, la movado de kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio arde disvolviĝis tra la tuta lando. Sub la gvidado de la partia komitato, la kamaradinoj de la grupo serioze lernis verkojn de Marks, Lenin kaj Prezidanto Maŭ, forte kritikis la doktrinojn de Konfucio kaj Mencio kaj ilian reakcian ideologion, kiel "senutilaj estas virinoj" kaj "viroj estas noblaj dum virinoj plebaj", kiujn imite distrumpetis Lin Biaŭ. Dum kritikado, lokomotivistinoj emocie diris: "Ni virinoj stiros lokomotivon, tio ne nur estas honoro por la virinoj, sed ankaŭ defio kontraŭ la malnova tradicia ideologio." Ili unuj post aliaj skribis sian decidon bone preni sur sin la pezan taskon.

Posedi la teknikon stiri lokomotivon precipe dizelan lokomotivon, estas afero nefacila, ĉar por manipuli la lastan kaj tuj senigi ĝian paneon, oni unue devas koni la cirkvitojn de ĝiaj diversaj partoj. Gvidate de la partia komitato, la lokomotivistinoj diligente lernis teknikon. En profunda nokto, tenante la cirkvitan karton en la mano ili parkere nomis diversajn signojn kaj konduktilojn antaŭ la objektoj. Dank' al la diligenta lernado ili bone konis poziciojn de konduktiloj, cirkvitojn kaj la tutan strukturon de la dizela lokomotivo. Sed, je la komenco de stirado ili renkontis alian malfacilon. Iufoje, kiam trajno eniris en stacion, malgranda Hju tutforte manpremis la bremsostangon kaj la lokomitivo haltis en mezo de kajo. Kiel oni povas haltigi trajnon precize en stacio? Post labortempo, la grupanoj faris diskutadon kaj fine trovis la kaŭzon ke oni ne posedis la bremsan leĝon. Post ripeta praktikado, ili bone posedis ĝin kaj sub la helpado de veteranaj majstroj, ili faris ĉion por koni geografian medion kaj karakteron de ĉiu stacio laŭlonge de la fervojo, tiel ke ili sukcesis en preciza haltigado de trajno.

Sed neebena estas la vojo antaŭenmarŝa. Iun tagon de la ĉijara februaro, malgranda Vang kaj malgranda Lu laboris kiel stiristinoj de la trajno n-ro 601. Dum veturado, ili subite trovis ke likas la ĉefa lubrika olepumpilo de la dizelo. Malakurata riparo kaŭzos gravan akcidenton. Por garantii sekuran ve-

turadon de la vagonaro, ili ambaŭ tuj faris riparon kaj evitis akcidenton. Ilia respondecemo ricevis laŭdon de multaj kamaradoj. Sed en iu kunveno de la grupo, malgranda Vang kaj malgranda Lu serioze faris memkritikon: "Kiel lokomotivistoj, ni ne devas kontentiĝi pri stabila stirado, preciza haltigado kaj rapida senpaneigado, sed devas elimini la akcidentojn antaŭ ilia apero." Antaŭ nelonge, lokomotivistinoj malgranda Hju kaj malgranda Van stiris la trajnon n-ro 48. Antaŭ starto ili atenteme kontrolis la lokomotivon, kaj trovis kaj riparis difektitan ŝraŭbon. Dank' al tio la trajno veturas ĉiam sekure.

## BORA GRUPO "LA OKA DE MARTO" EN ANTAŬENMARŜO

Sur la vojeto serpentanta sur monto, vico da bravaj junulinoj kun levita kapo kaj elstarigita brusto marŝas al batala posteno laŭte kantante *La Kanton de Geologiaj Taĉmentanoj.* Ili estas boristinoj de la bora grupo "La Oka de Marto" de la 101-a Taĉmento de la Pekina Geologia Buroo.

Borprospektorado estas malfacila laboro. En printempo de 1972, en movado de kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj reĝustigo de laborstilo, 19 junulinoj el la 101-a taĉmento firme decidis prospektori por socialisma konstruado, kaj tiel organizis sin en la bora grupo "La Oka de Marto" sub la varma subteno de la partia organizo. Por posedi manipulan teknikon, ili prenis tenajlon pezan je 3-4 kilogramoj kaj ekzercis sin en turnado de borstango. La bora turo kun alteco de 16-17 metroj staris sur montpinto. Rigardo de sur la turpinto kaŭzis kapturniĝon. Ne timante malfacilojn ili persiste ekzercis sin en grimpado kaj fine kutimiĝis al la laboro sur turo. Dank' al la diligenta ekzercado, ili rapide posedis la borprospektoran teknikon. En tiu ĉi jaro ili boris 12 truojn en tri lokoj kaj superplenumis la produktan taskon.

La granda movado de kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio vekis ĉe la boristinoj pli ardan revolucian spiriton. En la lasta jaro,



*Ujgura paraŝutistino Erziguj*

ili anstataŭigis sian bormaŝinon kun borkapablo de cent metroj per hidraŭlika bormaŝino kun borkapablo de tricent metroj kaj samtempe volis fari eksperimenton per etkalibra diamanta borilo. Nova estis la maŝino, nova estis la teknologio, kaj tial ili devis lerni ĉion de la komenco. Sed malfaciloj ne povis timigi la boristinojn armitajn per Maŭzedongpenso. Je la komenco, unu borilo estis difektita en la loko je malpli ol cent metroj profunda. Ili tre maltrankviliĝis. Sub la gvido de la partia filio, ili lernis la brilan verkon de Prezidanto Maŭ *Pri Praktiko* kaj komprenis ke vera scio originas de praktiko. Post ripetada polurado kaj sentima praktikado, ili iom post iom akumulis spertojn, kaj fine plenumis la unuan eksperimenton venkinte teknikajn malfacilojn unu post alia. Sur tiu bazo ili kaj teknikistoj kune esploris kaj pluapaŝe plibonigis teknologion. Pro tio la uzebleco de borilo longi-



*Lokomotivistino*

ĝis je pli ol kvin-oblo ol antaŭe kaj altiĝis la efikeco de prospektorado. En la jaro 1974, ili plenumis prospektoran laborkvanton pli multe je pli ol kvar-oblo kompare kun tiu de 1972, kaj pro tio ilia grupo fariĝis avangarda unuo de la Pekina Geologia Buroo.

### UJGURAJ PARAŜUTAJ SOLDATINOJ

En iu tago de frosta vintro, super iu paraŝuta kampo de nia lando stagnis densa nubaro kaj norda vento levis sablerojn. Ĉu la paraŝutaj soldatinoj povas fari prezentadon en tia vetero? Oni dube atendis.

Subite kun bruo de motoro iu aeroplano tra la nubaro flugis super la paraŝutan kampon. Momenton poste, elsaltis el la aeroplano de alteco de 15,000 metroj kvar malgrandaj nigraj punktoj kaj rapide falis malsupren. En palpebruma daŭro ili fariĝis kvar plene disvolviĝintaj arĝentaj floroj kaj komencis malrapide fali malsupren kaj fine ili falis sur difinitan lokon. La paraŝutaj soldatinoj estas Erziguj kaj ŝiaj tri kunbatalantinoj, la unuaj ujguraj paraŝutaj soldatinoj en nia lando.

Erziguj naskiĝis en revolucia familio kaj ricevis revolucian edukadon de infanaĝo. Ŝi arde deziris fariĝi soldatino de la Ĉina Popola Liberiga Armeo. En marto de 1974, ŝia deziro efektiviĝis. Ŝi kaj aliaj ujguraj soldatinoj venis al la paraŝuta taĉmento de iu paraŝuta trupo de ĈPLA. Je la foriro de la hejmloko, vilaĝanoj intime admonis: "Erziguj, vi estas unu el la unuaj ujguraj paraŝutaj soldatinoj. Renegato Lin Biaŭ intencis restaŭri kapitalismon kaj turni nian landon en kolonion de la social-imperiismo. Vi devas bone lerni kaj fariĝi firma soldatino en defendo de la diktaturo de la proletaro." Veninte al la trupo, Erziguj kaj ŝiaj kunbatalantinoj tuj partoprenis en kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio. Ŝi diligente lernis verkojn de Marks, Lenin kaj Prezidanto Maŭ kaj rapide levis sian konscion pri la bataloj inter la du klasoj kaj la du linioj kaj fariĝis aktivulino en lerno de teorio. Samtempe ŝi faris decidon nepre bone posedi paraŝutan teknikon, kaj ŝia paraŝuta nivelo rapide altiĝis en unu jaro.

Komence, kiam ŝi ascendis saltotabulon altan je du metroj por ekzerci sin pri surteriĝo, trejnisto postulis al ŝi salti 15 fojojn ĉiutage. Sed ŝi pensis en si, ke ŝi devas multe sin ekzerci. Ekde tiam, ŝi saltis pli ol 30 fojojn ĉiutage kaj poste ŝi iom post iom multigis ekzercajn fojojn. Por plifortigi sian korpon, ŝi ĉiumatene persistis en longdistanca kurado. Dank' al tio, ŝia korpo rapide plifortiĝis, kaj ŝi akiris senĉese pli bonajn sukcesojn en trejnado kaj antaŭdate finis sian surteran trejnadon.

Post kiam ŝi plenumis ĉiujn preparajn laborojn por aera paraŝuto venkinte multajn malfacilojn, la partia filio konsentis al ŝi unuan provparaŝuton en aero. Kvankam ŝi sukcesis en la unua provado, tamen ŝi trovis poste ke iam subite aperis maldekstra turniĝo. Ŝi pensis en si, ke ŝi nepre devas bone ekzerci sin en fundamenta tekniko per firma revolucia spirito. Ŝi utiligis ĉiujn tempojn por ekzerci sin, senĉese resumis spertojn kaj elĉerpis lecionojn kaj fine ŝi faris la movojn stabile kaj precize. Pro tio ŝi ricevis laŭdon en la spertointerŝanĝa kunveno okazigita de la partia komitato de la nomita paraŝuta trupo, en la pasinta oktobro.

# Sanprotekto al Virinoj kaj Infanoj en la Nova Ĉinio

EN la urboj kaj kamparo de Ĉinio oni ofte parolas pri tio, ke nun la infanoj estas pli sanaj kaj pli altaj. Tion konfirmis ankaŭ la enketado farita de koncernaj laborantoj. La maŭnan-oj loĝantaj en Huangiang-gubernio en Guanghi estas unu el la plej malgrandaj naciminoritatoj en nia lando. Nun, la infanoj de tiu popolo kreskas sanaj kaj altaj. Ekzemple, la korpo de infanoj kun aĝo de 7 jaroj estas pli peza je 3-5 kilogramoj kaj ilia staturo pli alta je pli ol 10 centimetroj ol tiuj de la samaĝaj infanoj antaŭ la Liberiĝo. Tion montris ankaŭ la enketoj faritaj en Pekino, Ŝanhajo, Vuhan kaj aliaj lokoj.

La altigo de sannivelo de la infanoj estas frukto de senĉesa pliboniĝo en la vivo de la laboranta popolo kaj la disvolviĝo de la laboroj en sanitara servo kaj sanprotekto al la virinoj kaj infanoj. En la socialisma Ĉinio la bonfarto de la lastaj estas aparte prizorgata kaj protektata de la Partio kaj la registaro. Tuj post la fondiĝo de la nova Ĉinio, la ŝtato jam difinis por tio specialan politikon. De la centra registaro ĝis la lokaj, la

*Infanoj de strata infanĝardeno de Nankino*



koncernaj instancoj havas specialajn administrajn organizojn aŭ personojn por gvidi la laborojn. La ĝeneralaj hospitaloj super la nivelo de gubernio kaj la hospitaloj fonditaj de fabrikoj kaj minejoj por la laboristoj kaj oficistoj ĉiuj havas ginekologian-obstetrikan kaj pediatrian fakojn, tiel por eksteraj kiel por internaj pacientoj. En urboj grandaj kaj mezgrandaj ĝenerale stariĝis ginekologiaj-obstetrikaj kaj infanaj hospitaloj. En la kamparo kuracejoj de popolaj komunumoj kaj la kooperaj kuracaj stacioj aŭ sanitaraj servoj de brigadoj ankaŭ zorgas pri tiu laboro. Por pli multe kulturi kuracistojn kaj laborantojn ginekologiajn, obstetrikajn kaj pediatriajn, la ŝtato fondis multajn novajn alt- kaj mez-gradajn medicinajn lernejojn kaj organizis trejnajn kursojn.

Ekde la Granda Proleta Kultura Revolucio, la higienaj laborantoj, firme plenumante la instrukcion de Prezidanto Maŭ **"meti la gravitan punkton de la kuraca kaj higiena laboro en la kamparon",** paŝon post paŝo uzas pli da fortoj, materialoj kaj monrimedoj en sanitara konstruado en la kamparo, kaj kulturis tie pli ol milionon da nudpiedaj kuracistoj. En la urboj, centmiloj da urbaj medicinaj laborantoj responde al la alvoko de la Partio, venis al la kamparo, iuj tie fiksloĝiĝis kaj aliaj partoprenis en rondira kuracado. Oni eĉ translokigis tutajn hospitalojn en multaj urboj al la kamparo, tiel ke la laboroj por protekti la sanon de virinoj kaj infanoj estas pliapaŝe plivastigitaj kaj plifortigitaj. Ekzemple du infan-hospitaloj de Pekino estas translokigitaj al landlimaj regionoj kaj aliaj ok ĝeneralaj hospitaloj kune kun siaj ginekologiaj-obstetrikaj kaj pediatriaj fakoj transloĝiĝis al la kamparo. Multaj renomaj doktoroj, specialistoj kaj profesoroj, ekzemple ankaŭ ginekologia-obstetrika profesorino Lin Kiaŭĝi kaj pediatro Ĝu Futong plurfoje partoprenis en rondira kuracado en la kamparo. Nun el la ŝtataj elspezoj por higieno 70% estas uzataj en higiena konstruado en la kamparo kaj ankaŭ pli ol duono de la malsanulaj litoj kaj higienaj laborantoj de nia lando troviĝas en la kamparo. Ankaŭ kuracaj aparatoj, medikamentoj kaj biologiaj preparaĵoj estas vaste uzataj en la kamparo. La ŝtato multfoje malaltigis la prezojn de medikamentoj, kiuj meznombre jam reduktiĝis ĝis 20% de tiuj en la komenca periodo post la Liberiĝo. Ĉio ĉi tio efike certigas la sanon al la kamparanoj kaj iliaj infanoj.



*Pediatrinoj de la Pekina Kuraca Taĉmento faras korpan ekzamenon al nacimalplimultaj geknaboj de elementa lernejo en Junnan-provinco.*

En la sanitaraj laboroj por la virinoj kaj infanoj, Ĉinio klopodas efektivigi la principon "preni preventon kiel ĉefan zorgon". Oni preventas malsanon antaŭ kaj frue kuracas ĝin post ĝia apero. Dank' al tio la sanstato de virinoj kaj infanoj senĉese pliboniĝas.

En sanprotekto de infanoj, novnaskitoj ricevas inokulojn de bovina, BCG k.a. vakcinoj. Al la infanoj estas injektataj en konvena tempo serumo kontraŭ difterio, kokluŝo kaj tetano kaj aliaj imunigaj vakcinoj. Ankaŭ la vakcinoj kontraŭ morbilo kaj poliomjelito estas vaste uzataj. Ĉiuj tiuj elspezoj estas pagataj de la ŝtato. Dank' al ĝenerala serovakcinado kaj disvolviĝo de la amasa patriota higiena movado, estas efike limigita la cirkulado de epidemioj. La epidemioj kiel variolo, ĥolero kaj pesto jam delonge estis eliminitaj. Ankaŭ la aperoj de difterio, kokluŝo kaj infantuberkulozo kaj aliaj malsanoj reduktiĝas de jaro al jaro. Ni prenu la gubernion Ĵutong de Giangsu-provinco kiel ekzemplon. Dank' al la klopodoj de la higienaj fakoj de diversaj niveloj kaj nudpiedaj kuracistoj, tetano de novnaskitaj beboj estas ĝenerale eliminita. La apernombroj de la ĉefaj epidemioj de infanoj okulfrape reduktiĝis. En la dek jaroj de 1963 ĝis 1973, la aperoj de poliomjelito reduktiĝis je 94.3%, de difterio je 84.5% kaj de kokluŝo je 61.5%, tiel ke la sanstato de la infanoj de la tuta gubernio multe pliboniĝadas.

Post la Liberiĝo de la tuta lando, la popola registaro kulturis grandajn nombrojn da modernaj akuŝistinoj, aktive reedukas la malnovajn akuŝintinojn kaj disvastigas la sciojn pri desinfekto dum akuŝado. Pro la elimino de akuŝfebro kaj tetano de nove naskitaj beboj, la pocentoj de morto de novnaskitoj rapide malaltiĝis. Tiuj en la malnova Ĉinio estis tre altaj, nome proksimume 200 el mil novnaskitoj.

Koncerne al sanprotekto de virinoj, pri la oftaj kaj ripetemaj malsanoj de virinoj oni faris laŭplane ĝeneralajn ekzamenon kaj kuracon en multaj lokoj de la tuta lando. En la periodo de 1970 ĝis junio de 1974, sole en



*Kuracistoj de kuraca stacio de Interna Mongolio ofte iras al dise lokitaj jurtoj sur la stepo por fari medicinan servon.*

Giangsu-provinco, la ekzamenoj faritaj al edziniĝintaj virinoj atingis sume 14,700,000 personfojojn. La malkovritaj malsanulinoj ĉiuj ricevis necesan kuracadon. Lastatempe oni ripetis la samon kun ĉefa celo por malkovri kanceron. Pri la uter-cervika kancero, kiu plej serioze malutilas al la sano de virinoj, oni unuapaŝe povas malkovri kaj kuraci ĝin en ĝia frua stadio. Dank' al tiu laboro multe pliboniĝis la sano de virinoj.

La virinoj en la nova Ĉinio havas egalajn rajtojn kiel la viroj en politiko, ekonomio kaj kulturo. Same kiel la viroj la virinoj laborantaj en ŝtataj institucioj, fabrikoj kaj minejoj, hospitaloj kaj lernejoj ĝuas senpagan kuracadon. Por garantii la interesojn kaj sanon de virinoj, la ŝtato difinis ke la laboristinoj kaj oficistinoj ricevas pension 5 jarojn pli frue ol la viroj. La virinoj en fabrikoj kaj minejoj emeritiĝas en aĝo de 50 jaroj kaj tiuj en ŝtataj institucioj en aĝo de 55 jaroj. Post emeritiĝo, ili ricevas pension variantan laŭ la laboraĝo inter 50% kaj 85% de ilia origina salajro. Post gravediĝo laboristinoj kaj oficistinoj rajtas plenumi malpli pezajn laborojn, ĝui pli longajn laborpaŭzojn kaj akcepti periode ekzamenadon antaŭ la akuŝo. La salajrata akuŝa forpermeso daŭras 56 tagojn ĝe-


nerale. Sed okaze de malfacila akuŝo aŭ nasko de ĝemeloj 70 tagojn. Por mamnutri la bebojn, la patrinoj disponas sufiĉan tempon por tio dum labortago. En la kamparo, la patrinoj kaj infanoj ĝuas la kooperan kuracadon, en ordinaraj kazoj la kuracado estas senpaga. Dum menstrua, graveda kaj mamnutra tempoj, la koncernaj komunumaninoj privilegie ricevas de la produkta taĉmento konvenan malpezan labortaskon en proksima loko.

En la urboj kaj kamparo de nia lando estas fonditaj multaj infanvartejoj kaj infanĝardenoj. Tio havas pozitivan signifon por garantii la sanon de la virinoj kaj infanoj, havigi al la virinoj pli da tempo por partopreni tiel en politika kaj kultura aktivado kiel en produkta laboro kaj ankaŭ por doni bonan edukon al la infanoj.

Ankaŭ en nacimalplimultaj regionoj de Ĉinio la sanitaraj laboroj por la virinoj kaj infanoj akiris grandan sukceson. En la malnova obskura socio la laborantaj popolanoj de tiuj lokoj peze suferis duoblan subpremadon klasan kaj nacian, multaj virinoj kaj infanoj mortis pro malsato kaj malsanoj, kaj pro tio rapide malkreskis tieaj loĝantaroj. Nun en la aŭtonomaj regionoj Hingiang, Tibeto kaj Interna Mongolio unuapaŝe funkcias retoj de kuracaj kaj higienaj organizoj kaj de sanprotekto al la virinoj kaj infanoj. La vicaroj specialaj por sanitaraj laboroj koncernantaj la virinojn kaj infanojn senĉese kreskas. En la Hingiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono la nunaj kuracaj kaj higienaj organizoj kaj personaro egalas respektive pli-ol-36-oblon kaj 82-oblon de tiuj en la komenca periodo post la Liberiĝo. En la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio, la 19 gubernioj loĝataj de mongoloj havas siajn kontraŭepidemiajn staciojn kaj sanitarejojn por virinoj kaj infanoj. La higienaj laborgrupoj por sanprotekti virinojn kaj infanojn estas regule senditaj rondire al paŝtejoj en la tuta regiono. En Tibeto antaŭ la Liberiĝo, la mizeraj tibetaj servutulinoj devis akuŝi en staloj, tre malaltaj estis la procentoj de la novenaskitaj beboj postvivantaj. Nun akuŝantinoj povas akuŝi en hospitalo senpage aŭ inviti akuŝistinon al la hejmo. La tuta tibeta popolo ĝuas senpagan kuracadon. Kompare kun la komenca periodo post la fondiĝo de la nova Ĉinio, nun la nombro de mongoloj pliĝis je 2.27-oblo, tiu de ujguroj je 43%, kaj tiu de tibetanoj je pli ol ducent miloj.



*Kuraca Taĉmento de Hunan-provinco al Tibeto kulturas tibetanajn medicinajn laborantojn.*



*Hidrogeologia grupo en laborado*

# Malfermo de Feliĉa Fonto por Dekmilo da Generacioj

— pri la atingoj de diversaj naciecoj de Du-an-gubernio por ekspluati subterajn riverojn

EN la Du-an-a Jaŭ-a Aŭtonoma Gubernio de Guanghi en suda Ĉinio, ĉie oni povas vidi, ke laŭ surmontaj serpentumantaj kanaloj kaj tra akveduktoj klara akvo fluas el subteraj riveroj al verdaj kampoj por akvumi grenplantojn. La gubernio troviĝas en karsta regiono kie ĉie leviĝas kalkrokoj en formoj tre kuriozaj kaj sub la tero sin kaŝas reto da subteraj riveroj. Estas videblaj ankaŭ multaj profundaj terfaŭkoj, kiuj ligiĝas kun subteraj riveroj. En la longa pasinteco antaŭ la Liberiĝo, en la pluva sezono subteraj riveroj ŝveliĝis, kaj la akvo elfluis kaj damaĝis grenplantaĵojn kaj domojn; dume en la seka sezono la kampoj fendiĝis pro sekeco, kiam homoj kaj bestoj ege bezonis akvon, sed la akvo en la profundaĵoj retiriĝis 40-50 metrojn sube neutiligeble. Inundo kaj sekeco, kiujn alportis la naturo, grandnombre ruinigis familiojn kaj pelis aliajn el ilia naskloko, kiel migrantojn.

## DUOBLA SUBPREMADO

Same kiel en aliaj lokoj en la malnova Ĉinio, ĉiufoje kiam okazis inundo aŭ sekeco, la lokaj riĉaj kaj potencaj bienuloj kaj reakciaj burokratoj ĉiam peze intensigis ekspluatadon al la laboranta popolo per uzurado, postulante farmopagon kaj ŝuldkvitigon. Ili okupis plejparton de la tero, arbaroj kaj akvofontoj de la gubernio. Malriĉaj kamparanoj devis pagi por kulturata tero, por trinkakvo, eĉ por loĝado en montkaverno kaj enterigo de mortintoj. Pro ĉia protesto, la koncernato estis punbatata en okazo bagatela

aŭ katenata en okazo grava, iafoje eĉ torturata. La kruela feŭda ekspluata sistemo plene senigis al la laboranta popolo materiajn kondiĉojn por venki naturajn katastrofojn.

La reganta klaso tutforte predikis teismon diigante la naturon kaj mistifikis popolon per mezepokaj superstiĉoj por kovri sian putrecon kaj senkapablecon, liberigi sin de riproĉo de la amasoj kaj konservi sian ekspluatadon kaj regadon. Koncerne al inundo kaj sekeco ili klarigis ke la montoj kaj riveroj estas regataj respektive de la koncernaj dioj kaj la subteraj riveroj de la "Drakdio". La akvoj en la profundaĵoj elfluas neniom aŭ ekscese laŭ la varianta humoro de la "Drakdio", tiel ke la gubernio ricevas akvon, sekecon aŭ inundon laŭe. La tiama reakcia registaro eĉ starigis "altaron" ĉe profundaj terfaŭkoj por ke oni tie incensu kaj oferu vinon por esprimi adoron al dio. Precipe en senpluva jaro la loĝantoj devas ĵeti hundojn kaj katojn en la faŭkojn kiel oferaĵojn al dio. Sed forpasis jaro post jaro kaj la "Drakdio" montris nenian

*Lan Cajkiu (fronte) esploras la subteran akvofonton kune kun sia kamaradino.*



favoron, ĉiujare okazis aŭ sekeco aŭ inundo, kaj same kiel antaŭe multaj homoj formigris aliloken kaj senhejmiĝis.

## FRAKASO DE MALNOVA SPIRITA KATENO


La fondiĝo de la nova Ĉinio ne nur likvidis la reakcian reĝimon sed ankaŭ malfermis vastajn perspektivojn al la laboranta popolo por ekkoni kaj reformi la naturon. Ekde la Liberiĝo, sub la gvido de la Partio kaj popola registaro, la diversnaciecaj popolanoj de Du-an energie entreprenis akvoutiligajn konstruadojn: dragadon de riveroj, fosadon de drenaj kanaloj, forstumadon kaj formadon de ŝtuparaj kampoj sur montoj, por redukti damaĝon de akvoabundo kaj konstruadon de akvorezervejoj kaj surmontaj lagetoj por senĉese plivastigi irigaciatan areon, rapidigante la disvolviĝon de agrikultura produkto. Sed, antaŭ la Granda Proleta Kultura Revolucio, nemalmultaj lokoj ankoraŭ suferis sekecon kaj akvomankon.

En la Granda Proleta Kultura Revolucio, la diversnaciecaj popolanoj de Du-an-gubernio levis sian konscion kaj liberigis siajn pensojn dank' al lernado de Marksismo-Leninismo kaj verkoj de Prezidanto Maŭ. En la heroaj faroj de Daĝaj-anoj, kiuj reformis la naturajn kondiĉojn de sia malriĉa hejmloko, ili ekkomprenis ke tute eblas ŝanĝi la mizeran fizionomion de ilia montregiono, se ili nur havas la aŭdacon kuraĝe revolucii kaj la spiritan pretecon sin apogi sur la propraj fortoj kaj pene lukti en malfavoraj kondiĉoj. Ili kritikis la antaŭdestinismajn rezignemajn pensojn, per cito de la atingoj efektivigitaj de la gubernio en reformado de montoj kaj akvoj kaj la teismon por frakasi la malnovan spiritan katenon. Komunumanoj fiere diris: "Ne estas dio sur montoj, nek drakdio en subtera rivero. Se estas ia 'dio' aŭ 'drakdio', al kiu apartenas la montoj kaj riveroj, ĝi estas neniu alia ol ni mem!" La popolo de Du-an decide ekagis kiel mastro de la naturo kaj prenis ekspluatadon kaj utiligon de la subteraj riveroj kiel sian ĉefan taskon.

Por helpi ilin en esploro de subteraj riveroj, la Revolucia Komitato de Guanghi-a Ĝŭang-nacia Aŭtonoma Regiono alsendis hidrogeologian laborgrupon, kies membroj sub la unueca gvido de la gubernia komitato de KPĈ formis kun lokaj kadroj kaj komunumanoj multajn esplorajn grupetojn. En la tuta gubernio pli ol 2,100 komunumanoj de diversaj naciecoj partoprenis en observado pri subteraj riveroj, sondado de ilia interligiteco, borado de esplorputoj, en provado de pumpado kaj aliaj laboroj. Tre detalaj enketoj kaj esploroj estis faritaj pri la subteraj riveroj en 11 komunumoj. Timante nek danĝerojn nek penadojn, oni trairis pli ol 2,500 kilometrojn en la montregiono kaj esploris pli ol 170 profundajn kaj malfacile atingeblajn kavernojn por ekkoni la devenon kaj forirejon de subteraj riveroj, manifestante la firman volon kaj grandan forton de la popolamasoj armitaj per Maŭzedongpenso en reformado de la naturo.

Sep komunumanoj de Fenghiang-brigado de Dahua-komunumo iris al profunda kaverno en sia brigado sub direktado de la partifilia sekretario Vej Ŝujen. La kavernon ĉirkaŭitan de krutaj rokmuroj animpreme obskuran, antaŭe neniu kuraĝis eniri. Vej Ŝujen pensis: "Kiel sekretario de la partia filio mi devas doni ekzemplon al la aliaj." Kun longa kablo ligita al sia talio, li venis la unua al la fundo de la kaverno profunda je 45 metroj kaj trovis ke ĝi komunikiĝas kun subtera rivero. Post pli ol duhora esplorado li ekkonis la irdirekton de la fluo; tio kreis kondiĉon por poste ekspluati la subteran riveron.

Lan Cajkiu, 16-jara jaŭ-ino de Giusong-brigado de Disu-komunumo, kiu respondecis pri la laboroj de observado de iu punkto de subtera akvo, pruvado de ĝia ligiteco kaj analizo de ĝia akvokvalito, ĉiutage malleviĝis trifoje en la kavernon profundan 40 metrojn por mezuri la akvonivelon kaj preni kvanton da akvo por fari analizon. Ŝi faris tion en daŭro de pli ol 480 tagoj ĝis ŝi finplenumis la taskon. En la tago antaŭ Printempa Festo, ŝi devis noktomeze preni akvon bezonatan por eksperimenti la ligitecon. Por ne preterlasi la ĝustan tempon, ŝi ne fermis siajn okulojn ĝis la momento. Ŝia devsento al la laboro tiel kortuŝis la patron ke la lasta akompanis ŝin al la kaverno ĝis ŝi finis sian laboron.



*Tian Ĉanghi (la unua de dekstre), sekretario de la gubernia komitato de KPĈ faras planon pri kampokonstruado kune kun diversnaciecaj komunumanoj.*

Dank' al la komuna klopodo de diversnaciaj komunumanoj de la tuta gubernio kaj la hidrogeologiaj laborantoj, estas unuapaŝe traesplorita la ĝenerala stato de la subteraj riveroj en tiu ĉi areo. Tie troviĝas multaj karstaj kavernoj grandaj kaj malgrandaj, kiuj interligiĝas kun 23 subteraj riveroj en 11 komunumoj kun abunda akvofonto. La sekreto de la subteraj riveroj, kiujn la reakciuloj longtempe uzis por mistifiki la laborantan popolon, fine estis malkovrita.

## EKSPLUATO DE SUBTERAJ RIVEROJ

Laŭ akirita materialo pri la dislokiĝo de



*Torentas fontakvo.*

por elpumpi la akvon. Nangiang-brigado de Disu-komunumo havas profundan teraperturon, kiu similas al ŝakto, situantan en branĉo de iu subtera rivero. Kiel instali al ĝi pumpilon? Por solvi tiun problemon Tan Juvej, sekretario de la partia filio de la brigado, vokis ĉiujn membrojn al kunveno por interkonsiliĝi. Iuj proponis loki pumpilon supre ĉe la aperturo, aliaj proponis meti ĝin sube en la "ŝakto". Evidentiĝis en diskutado ke ambaŭ proponoj ne taŭgas. Ĉar, se pumpilo estos instalita sube, ĝi facile difektiĝos, kiam ŝveliĝos la subtera rivero; se oni metus ĝin supre, la maŝino ne povos elpumpi akvon dum seka sezono, kiam la akvonivelo falos. Poste ili decidis konstrui ferbetonan boaton por ke pumpilo funkciu sur ĝi normale dum ĉiu variiĝo de la akvonivelo sen danĝero de subakviĝo.

La unua ferbetona boato en la gubernio estis finkonstruita. En la tago kiam komenciĝis prova pumpado, la loĝantoj junaj kaj maljunaj kolektiĝis de ĉiuj flankoj al la aperturo de la kaverno. Kiam la akvo elŝpruciĝis el du dikaj tuboj kaj fluis al kampoj, ĉiuj eksaltis de ĝojo. Iu 89-jara onklino ĝŭangnacieca levis plenmanon da akvo, gustumis kaj gustumis kaj diris ĝoje: "En la malnova socio la subtera rivero alportis al ni tiom da suferoj, sed hodiaŭ ĝi jam servas al irigaciado de niaj rizkampoj, tion ni ŝuldas al la bona gvidado de Prezidanto Maŭ!"

Sub inspirado de la sperto de Nangiang-brigado leviĝis en la tuta gubernio arda amasa movado por ekspluati subterajn riverojn. En la batalo de reformo de la naturo la diversnaciecaj popolanoj montris neelĉerpeblan saĝon kaj kreivon. En Doŭje-brigado sin trovas profunda kaverno, al kiu ne taŭgis boato pro la oblikveco de ĝiaj muroj kaj la

subteraj riveroj, la Gubernia Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio en Du-an ellaboris planon pri ĉiuflanka ekspluatado de subteraj riveroj. Tiu plano spegulis dezirojn de la diversnacieca popolo de la gubernio kaj kuraĝigis ĝin venki ĉiujn malfacilojn por efektivigi la planon. Disvolvante la spiriton de sinapogo sur siaj propraj fortoj kaj penema lukto en malfavoraj kondiĉoj la komunumanoj en la gubernio ĉiumaniere ekspluatis kaj utiligis komplete la subterajn riverojn, samtempe kun fosado de drenaj kanaloj por preventi inundon.


En Du-an la subteraj riveroj plejparte kuŝas en profundeco de 30-40 metroj sub la tero. La teraperturoj, kiujn ligas subteraj riveroj estas tre profundaj kaj la akvonivelo varias grandmezure, pro kio prezentiĝis problemo

vasteco de ĝia fundo. Oni alfaris du paralelajn relojn sur la muro por porti pumpilon en ĉasio movebla sur la reloj per ŝtalkablo kaj vinĉo. Oni povas facile levi kaj mallevi la pumpilon laŭbezone kaj tio kostis eĉ malpli ol ferbetona boato.

Ankaŭ la aliaj brigadoj konstruis diversformajn akvolevajn instalaĵojn. Iuj brigadoj konstruis platformon sur pilieroj por instali pumpilon kaj aliaj konstruis baraĵon en subtera rivero por elpumpi akvon per hidraŭlika pumpilo. En la brigadoj kie ne estis teraperturo kondukanta al subtera rivero oni mem boris sondputojn por trovi subteran riveron kaj utiligis ĝin per konstruo de ŝakto. En la lastaj jaroj oni jam sukcesis utiligi subterajn riverojn por produkto en 229 lokoj kaj akiris ĝojindajn sukcesojn en batalo kontraŭ la naturo.

Kun la ekspluatado kaj utiligo de subteraj riveroj grandaj ŝanĝiĝoj okazis al Du-an-gubernio. La agroj de la gubernio ricevis riĉan rikolton en sinsekvaj jaroj. En Nangiangbrigado, kiu estis la unua en utiligo de subtera rivero en la gubernio, antaŭe oni devis, dum senpluva sezono iri dekkelkajn liojn por alporti akvon, nun tio tute ne necesas, ĉar oni sukcesis konduki subteran akvon en la vilaĝon. Samtempe pli kaj pli vastiĝas riĉrikoltaj kampoj garantiitaj same kontraŭ inundo kaj sekeco. Pasintjare la totala grenprodukto de la brigado kreskis per kvaroblo en komparo kun tiu antaŭ naŭ jaroj. La subteraj riveroj katastrofaj por la popolo de jarmiloj, nun estas utiligataj ankaŭ por produkti elektron. En la tuta gubernio ekfunkciis nun kvar hidraŭlikaj elektrostacioj ne nur provizante la agrikulturan produkton per energio, sed ankaŭ alportante lumon al izolaj montvilaĝoj. Ĝi plie kuraĝigas la Du-an-an popolon al konstruado de pli bela estonteco!

*Plenigitaj grenejoj post riĉa rikolto*



# Ne por Ĉasi Profiton

SOCIALISMA komerco celas nur tutanime servi al la popolo, sed ne ĉasi profiton. Legu ĉisube la faktojn de kelkaj vendejoj de Ŝanhajo.

En Manĝaĵa Butiko Hinghuo, oni tagnokte povas aĉeti sian bezonatan manĝaĵon. Laborantoj de la butiko iniciative portas manĝaĵojn al homoj, kiuj ne povas viziti butikon pro maljuneco, malforteco, malsano kaj kripleco, kaj ne postulas krompagon.

En la urba kvartalo de Ŝanhajo troviĝas 5,700,000 loĝantoj. En profunda nokto, sur stratoj rapidas ankoraŭ multaj laboristoj al aŭ de noktodeĵoro, komunumanoj, kiuj portas al la urbo legomojn kaj manĝaĵojn, kaj aliaj laborantoj. Ĉu oni devas servi aŭ ne al ĉi tiuj homoj? Tio estas nova problemo por komercaj laborantoj.

La nomita butiko, kiu situas ĉe vivoplena vojkruciĝo, la unua en la urbo komencis tagnoktan servadon ekde la jaro 1968.

La laborantoj de la butiko ne nur servas en la butiko, sed ankaŭ ofte en nokto portas kelkspecajn manĝaĵojn al fabrikoj por ke laboristoj povu aĉeti ilin en laborpaŭzo anstataŭ post laboro.

Informiĝinte de proksimaj hospitaloj ke diabetuloj bezonas manĝi kukojn kun malmultaj sukero kaj amelo, ili interkonsiliĝis kun laboristoj de kukfarejo por ke tiuj provfaru tiajn kukojn por kontentigi la bezonon de la malsanuloj.

Nun en Ŝanhajo jam troviĝas pli ol 1,400 tagnoktaj aŭ matenvesperaj vendejoj kiel Hinghuo.



*Komizoj de la tagnokta butiko Hinghuo servas en la Ŝanhaja Koltuka Fabriko.*

La komercaj laborantoj observas la instrukcion de Prezidanto Maŭ Zedong pri "servo al la popolo" kaj konsideras ĉion por la popolaj interesoj.

Nun en multaj butikoj de Ŝanhajo krom vendado de ŝtofoj oni aldonis specialajn vendstablojn por vendi diversspecajn duonprilaboritajn vestpecojn. Tiujn sammezurajn pecojn oni kune tajlas, kio povas ŝpari ŝtofon, tamen la prezoj ne enkalkulas pagon por prilaborado.


"Tio prezentas maloportunaĵon por ni mem, sed utilas al vastaj laborantaj amasoj kaj samtempe al la ŝtato," diris Vang Hinkang, maljuna vendisto de la Ŝanhaja Deka Magazeno. Tiu magazeno nun vendas pli ol 500 specojn da tajlitaj vestpecoj. Ekde la jaro 1970, la magazeno ĉiujare ŝparis pli ol 40,000 metrojn da ŝtofo por la klientoj kaj la ŝtato.

Por sama celo, nemalmultaj vendejoj de Ŝanhajo iniciative aldonis multajn servojn. Karbovendejo eĉ instruas al klientoj kiel ŝpari karbon. Iu maljunulino laŭdis ilin: "En la malnova socio, kapitalisto zorgis nur monĉason. Ju pli multe da karbo vendiĝis, des pli multiĝis profito. Nun laboristoj kaj oficistoj de la karbovendejo propagandas karboŝparan metodon, tio ne nur subtenas la industrian konstruadon, sed ankaŭ ebligas al klientoj ŝpari sian elspezon. Tio ja estas nova fizionomio de la nova socio."

Se oni volas nur ĉasi profiton, do granda magazeno tute ne bezonas vendi komercaĵon nur kun kosto de unu cendo. Tamen, en la Unua Magazeno, la plej granda podetala vendejo de Ŝanhajo, oni per unu cendo povas aĉeti butonon, pinglon, leterpaperon, koverton, prempinglon kaj aliajn 38 specojn de varoj. Se oni perdis unu ŝakpecon, oni povas aĉeti ĝin kontraŭ kelkaj cendoj en la magazeno.



*Komizinoj de karbovendejo riparas fornojn por loĝantoj.*



*Komizo de ŝtofbutiko "Nova Ĉinio" tajloras por klientoj.*

"En la malnova socio, homoj, kiel mi grizharulo, delonge jam estis eksigitaj. Hodiaŭ, mi tamen laboras kiel estro de la grupo de laborprotektaj objektoj de la magazeno," diris 55-jara Lin Jingkjuan, vendisto de la Ŝanhaja Deka Magazeno. Lia vorto spegulis ŝanĝiĝon de socia pozicio de vastaj vendistaj amasoj de nia lando.

Lin Jingkjuan eklaboris kiel metilernanto en la magazeno, kiu antaŭe estis nomata Jong-an-a Kompanio, en la jaro 1937. Li diris: "Tiam kapitalisto ellaboris 72 magazenajn regulojn, se iu ajn komizo malobeis unu el ili, do tiu estis tuj eksigita, kaj malsanaj komizoj eĉ ne kuraĝis viziti kuraciston, por ne doni kaŭzon por esti elpelitaj."

Kiel aliaj laborantaj popolanoj de la nova Ĉinio, ĉiuj vendistoj ricevis garantion en la laboro kaj la vivo. Ili havas kontrolan rajton pri administra direkto de la magazeno. Ili ne bezonas flati klientojn kiel komizoj de la malnova socio per ŝajnigita afableco, sed laboras pli konscience ol iam ajn antaŭe por bonigi sian servadon.

Ankaŭ la vastaj amasoj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj tre fidas kaj subtenas ilin. En festotago kiam ilia komerca laboro estas intensa, nemalmultaj amasoj volonte helpas ilin rezignante ripozon.

# Meteologiaj Studoj sur Altebenaĵo

VETERO havas gravan rilaton kun ekonomia kaj nacidefenda konstruado, kaj ĝi influas ankaŭ nian ĉiutagan vivon. La vento, pluvo, fulmotondro, hajlo k.a. estas rezultoj de la movado de la atmosfero, kiu kovras nian terglobon. Kaj ĝia movado estas influata siavice ofte de la diversaj karakteroj de la tersurfaco. Krom la oceanoj, altebenaĵoj estas unu el la gravaj faktoroj, kiuj influas la movadon de la atmosfero kaj variiĝon de la vetero.

Ĉinio havas vastajn altebenaĵojn, inter kiuj apartan lokon okupas la Kinghaj-Tibeta Altebenaĵo, kiu kun meznombra alteco de 4,000 metroj super la marnivelo ampleksas kvaronon de la kontinenta areo de nia lando. Ĝia topografio estas tre kompleksa kaj tie la klimato estas tre varia. Kian influon ĝi havas sur la vetero de nia lando? Pri tiu demando niaj meteologoj esploris en la lastaj jaroj kaj akiris ĝojindajn fruktojn.

La esploroj estis faritaj ĉirkaŭ la temo pri "la karaktero de la klimato de la Kinghaj-Tibeta Altebenaĵo kaj ĝia influo al la vetero de nia lando", precipe pri la leĝoj de topografia influo al la vetero de nia lando.


La esplorado montras ke ĝi havas apartajn karakterojn veterajn kaj klimatajn, kaj estas unu el la kaŭzoj de la pluvego kaj hajlo de nia lando. Samtempe ĝi estas ankaŭ loko por reformi la veterajn faktorojn de ekstere. Nun jam estas malkovrita unuapaŝe, ke devenloko de depresioj (malaltaj premoj), kiuj naskas grandajn pluvojn en la sudokcidenta parto de Ĉinio, estas la altebenaĵo. Sub konvenaj kondiĉoj alte super la loko amasiĝas kiel nubamaso kaj nubregiono aŭ nubzono, kiuj fine moviĝas el la altebenaĵo kaj influas la pluvadon en la orienta parto de nia lando. La meteologoj konstatis ankaŭ ke la ŝtormoj el Bengala Golfo de longa tempo rekonataj kiel nepovantaj transpasi la altan montaron Hi-

malajon fakte povas ĝin transpasi de ĝia suda parto, influante la veteron de Junnan kaj Tibeto.

Post ripetada esplorado kaj ekkonado, ili plie certiĝis ke la altebenaĵo estas varmfonto dum somero. Pro ties efiko formiĝas super ĝi forta altpremo. Okaze, se tiu moviĝas al la nordo frue kaj devie al oriento super la kontinento de nia lando, do nia orienta parto ofte trafiĝas de sekeco, dum en nia okcidenta parto abundas pluvoj. Male se ĝi moviĝas norden malfrue kaj restas super la altebenaĵo, tiam en la orienta parto ofte aperas superakvo, dum al la okcidenta parto mankas pluvoj aŭ aperas sekeco. Kiam la altpremo el Kinghaj kaj Tibeto moviĝas orienten kaj interkovriĝas kun tiu el la subtropiko de Pacifiko, tio ofte kaŭzas dum somero finiĝon de pruna pluvado kaj komenciĝon de la seka vetero de fuoj*. Ankaŭ en simuladaj eksperimentoj pri altebenaĵa klimato kaj pri la influoj de la altebenaĵo al la ĝenerala cirkulado de la atmosfero la meteologoj akiris multajn sukcesojn.

Tiuj rikoltoj estas jam utiligataj en ĉiutagaj veterinformoj. La meteologiaj laborantoj de la Tibeta Aŭtonoma Regiono jam trovis kaŭzon de neĝego en la suda parto de la regiono kaj povis pli precize antaŭprognozi neĝadon, dank' al la nova ekkono pri la fakto ke la ŝtormo el Bengala Golfo povas transpasi la Himalajon. La meteologiaj laborantoj de Siĉuan-provinco povas fari nun surbaze de la karakteroj kaj leĝoj de la moviĝo de la alta premo super la Kinghaj-Tibeta Altebenaĵo analizojn kaj antaŭprognozon pri la loka sekecstato. Multaj niaj meteologoj faras sintezajn observojn kaj analizojn, kombinante la menciitajn esplorfruktojn kun la aliaj faktoroj de ĝenerala cirkulado de la atmosfero, kaj senĉese plialtigas la kvaliton de veterinformoj kaj plie la esploradon pri novaj problemoj.

Por solvi la meteologiajn sekretojn de la Kinghaj-Tibeta Altebenaĵo, niaj meteologoj faris multon post la Liberiĝo, sed pro la ĝenado de la reviziisma linio, la esplora laboro ne akiris okulfrapajn rezultojn. Nur post la Granda Proleta Kultura Revolucio kaj la Movado de Kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio, sub la gvido de la proleta revolucia linio de Prezidanto Maŭ, la ĉinaj meteologiaj laborantoj disvolvis grandan revolucian kritikon al la kontraŭrevolucia reviziisma linio antaŭenpuŝita de Liu Ŝaŭki kaj Lin Biaŭ kaj, rompinte al si la superstiĉojn kaj liberiginte siajn pensojn, en mallonga tempo akiris rimarkindajn sukcesojn en scienca esplorado pri la altebenaĵa meteologio.




*Laborantoj de la Meteostacio de Lasao delasas sondbalonon.*

La ĉinaj meteologiaj laborantoj persiste faras ĉiutagajn observojn sur la tero kaj en alteco, sub la tre malfavoraj kondiĉoj en montregiono kaj altebenaĵo kaj uzante meteologian radaron kaj ekipaĵon por ricevi nubbildojn dissenditajn el sputnikoj kaj akiris per tio grandkvantajn materialojn por fari sciencan esploradon. Inter ili tiuj de nacimalplimultoj ankaŭ ricevis bonan trejnadon kaj grandajn


progresojn. Inter tiuj de la Tibeta Aŭtonoma Regiono la tibetanoj okupis pli ol 30% kaj iuj eĉ estas elektitaj por funkcii en gvidaj postenoj. En la menciita scienca esplorado la nacimalplimultaj meteologiaj laborantoj faris pozitivajn kontribuojn.

---

** Estas tri fuoj en ĉina tradicia meteologio, nome la komenca, la meza kaj la fina. La tri fuoj estas la plej varma periodo en la jaro. ĝenerale de la meza tagdeko de julio ĝis la lasta tagdeko de aŭgusto.*



*La Meteostacio de Lasao ricevas kaj analizas nubobildon de sputniko.*



*Laborantoj de fizika instituto faras simuladan eksperimenton pri la influo de la varmigo de Kinghaj-Tibeta Altebenaĵo al ĝenerala cirkulado de la atmosfero en la Orienta Azio en somero.*




## NOVA IRIGACIA KONSTRUO EN ŜENHI

La loka popolo en la supra kaj meza basenoj de Vejhe-rivero en Ŝenhi finkonstruis novan irigacian projekton utiligantan la akvon de la rivero. En ravina parto de la rivero oni konstruis riverbaraĵon por konduki la riverakvon al altebenaĵo norde de la rivero. Krom la centra konstruaĵo ĉe la kapo de la kanalo, estas talusita per cemento la trunka kanalo je 220 kilometroj longa kaj konstruitaj pli ol 17,000 diversaj konstruaĵoj. La trunka kanalo transpasas pli ol 180 riverojn kaj fosaĵojn, trairas 13 tunelojn, 11 akveduktojn kaj 4 sifonajn instalaĵojn, kaj ligiĝas kun kvin akvorezervejoj, sep pumpstacioj, 874 branĉaj kanaloj, 348 montdeklivaj lagoj kaj 2,877 pumpilputoj, formante tiamaniere reton kombinantan alkondukon, konservon kaj levadon de akvo.

Tiu konstruaĵo kreis kondiĉojn por stabila altprodukto de agrikulturo por Baŭgi kaj aliaj naŭ gubernioj kaj urboj, pliigante ĉiujare la grenan kaj kotonan produktojn de la irigaciata areo.

HIANG HJUAN:

# La Mano de l' Sekretario de Partia Komitato

*Aperis jam grandega aro*
*Da poeziaj verkoj pri la mano.*
*Sed nun mi volas kanti pri l' manparo*
*De la sekretari' de l' partikomitato,*
*La man' unua* de l' fabrika personaro.*

*Ĝi estis tiu de hejtisto ja antaŭ ok jaroj,*
*Per kiu estis afiŝita la unua*
*Revolucia dazibaŭ** sur fabrikan portalon:*
*"Bambardu al potenctenant' iranta la kapitalisman vojon" —*
*Bum, tondro! la kanona fajr' leviĝis ĝis nubaro.*

*Post la ok jaroj, jam en ŝtalon*
*Estis turnitaj liaj manoj,*
*Kiujn forĝadis la kultur-revolucia fajro*
*Kaj forĝis ŝtormoj de kritikoj kontraŭ Lin Biaŭ, Konfucio.*
*Vidu, pli granda iĝis l' energio kaj pli dikaj — fingroj, kaloj.*

*La fingroj tiel dikaj*
*Ja ostojn havas plej malmolajn,*
*Sub ili tiom da baroj rompiĝis ĉeartikaj.*
*Kiom, manipulante plumon, ili jam repuŝis kontraŭfluojn,*
*Ho, en revolucio kaj produkto lertas la manoj unikaj!*

*Laboregante kun pli granda energio,*
*Li rapidigas la progreson por la patroland' en*
*La konstruad' kaj de l' disvolv' de industrio:*
*Eksperimenti en varmegaj tagoj antaŭ arda forn', kun*
*Vestar' pentrita plene per ŝvitspuraj strioj.*

*Kian laborentuziasmon signas la pli dikaj kaloj!*
*En lia kor' ruliĝas ŝtormaj nuboj de la mondo,*
*La ŝultroj povas porti eĉ montaron.*
*Kun la princip' "apogi sin sur propraj fortoj" ĉiam en memoro,*
*Kaj kap' levita marŝas li en paŝoj grandaj sen egalo.*

*Jen la sekretario de l' partia komitato havas tian manon,*
*Li estas la unua mano nia.*
*"Cent aŭdoj ne egalas solan vidon" diras popolanoj.*
*Se volas vi lin vidi per propraj okuloj,*
*Do, venu kun mi — tio ne montriĝos al vi vano!*

*Se li troviĝas ne sur konstruejo, ni serĉadon tamen ne bezonas:*
*Se li forlasas maŝinejon, tuj li venas al la forno.*
*Jen vidu, al amaso nun korverŝe li sin donas.*
*El poŝo li elprenas cigaredostumpon —*
*Sed ĝin bruligi li ne povas. Ha, en ŝvito ĝi jam dronas.*

*Pro rid' sin klinas la metilernantoj riverence,*
*Kaj majstroj ne kapablas fermi siajn buŝojn.*
*"Sur front' produkta la unua man' laboras konscience*
*Inter ni, tiel en penado kiel en vivstilo,*
*Kiel lokomotivo la revolucion tiras li potence."*

---

* La unua mano havas sencon por ĉinoj: la plej alta respondeculo de iu organizo, administracio aŭ entrepreno. La vorto "mano" mem aludas ankaŭ laborforton.

** Dazibaŭo: opiniesprimo en formo de manskribita artikolo en grandaj literoj sur grandaj paperoj surgluitaj sur muro.

# La armeo kaj popolo de Sudvjetnamio triumfe marŝas antaŭen



Batalantoj de la Sudvjetnama Liberiga Armeo transpasas Huong-riveron kaj marŝas en la urbon Hue.



Popolanoj de la urbo Hue devige translokitaj de la malamiko revenis aro post aro al sia hejmloko.

Kiel oni scias, ke depost la subskribo de la "Interkonsento pri Finado de la Milito kaj Restarigo de Paco en Vjetnamio", la Vjetnama Demokratia Respubliko kaj la Provizora Revolucia Registaro de la Respubliko de Suda Vjetnamio rigore observas ĝin kaj faris senĉesan klopodadon por plenumi ĝiajn diversajn artikolojn. Tamen tute male, la kliko de Nguyen Van Thieu, subtenate de Usono, jam freneze kriaĉis pri anekso de la liberigitaj regionoj provante elimini la revolucian regpotencon, kiam la inko de pariza interkonsento ankoraŭ ne sekiĝis. Dum la lastaj pli ol du jaroj, ĝi senbride lanĉis preskaŭ sesdekmil-foje atencojn kontraŭ fajroĉesigo, kvardek mil el kiuj estis mordetaj atakoj kaj "pacigaj" militadoj kontraŭ liberigaj regionoj. La kliko de Nguyen Van Thieu ne nur rifuzis respondi al serio da raciaj proponoj elmetitaj de la Provizora Revolucia Registaro por efektivigi la parizan interkonsenton, sed ankaŭ arbitre interrompis la interkonsiliĝadon de ambaŭ flankoj de Sudvjetnamio okazigata en Parizo kaj senĉese subfosis la normalajn aktivadojn de la Unuigita Milita Komisiono. La krimagoj de la kliko de Nguyen Van Thieu detruantaj la parizan interkonsenton estas fere atestitaj kaj nerefuteblaj. Tial, estas tute kompreneble kaj juste ke la armeo kaj popolo de Sudvjetnamio respondis per heroaj rebatoj kontraŭ la atakanta sajgona puparmeo por protekti la parizan interkonsenton. Sed la kliko de Nguyen Van Thieu senhonte kalumniis ke la rebatoj "tretis la parizan interkonsenton", tio estas nenio alia ol krioj de ŝtelisto por kapti ŝteliston.

La patriotaj armeo kaj popolo de Sudvjetnamio akiris venkojn unu post alia en rebatoj al la malamiko ekde januaro de la kuranta jaro kaj liberigis sinsekve la provincojn Phuoc Long norde de Sajgono, Dac Lac, Kom Tum, Gia Lai kaj Phu Bon sur la meza altebenaĵo kaj Quang Tri en la plej norda parto de Sudvjetnamio. En la 20-a de marto, ili liberigis ankaŭ la provincojn Binh Long norde de Sajgono, Quang Ngai ĉe marbordo kaj Quang Duc nordoriente de Sajgono. En la 26-a de marto, ili liberigis la provincon Thua Thien ĉe marbordo kaj la antikvan ĉefurbon Hue, en la 27-a de marto la provincon Quang Nam meze de Vjetnamio kaj en la 28-a la provincon Quang Da. Skuate de tiuj sinsekvaj venkoj, la pupa armeo de la kliko de Nguyen Van Trieu sin kaŝanta en la urbo Da Nang teruriĝis en paniko ne plu havanta batalspiriton.

Antaŭtagmeze de la 28-a de marto, la Sudvjetnamaj Popolaj Liberigaj Armitaj Fortoj triumfe antaŭenpuŝis sin al la urbo Da Nang, denorde el la monto Hai Van kaj Lien Chieu, deokcidente el Hieu Duc kaj Hoa Vuong kaj desude el Hoi An kaj Vinh Dien. Ankaŭ la urbanoj de Da Nang rapide sin ĵetis en la batalon por akiri la superregon de la urbo. Milnombraj pupaj soldatoj kaj oficiroj ribeliĝis kaj venis al la revolucia flanko kun armiloj, puninte siajn obstinajn reakciajn komandantojn. En tiu cirkonstancaro, la pupa armeo de la urbo falis en panikon kaj konsternite forfuĝis. Precize en la 15-a horo de la 29-a, la patriotaj armeo kaj popolo de Sudvjetnamio komplete prenis la urbon Da Nang sub sia regado.

La armeanoj kaj popolanoj de la liberigita regiono de Tay Minh de Sudvjetnamio aktive helpas la popolon en nove liberigita regiono per greno k. a.






Liberiĝis la popolanoj de Hue, kiuj longe suferis sub la regado de la kliko de Nguyen Van Thieu.


Ĝis la 22-a de aprilo, la sudvjetnamaj patriotaj armeo kaj popolo jam liberigis 22 provincojn. Bonega estas tie la situacio. La diktatora kaj militema ĉefo de la sajgona kliko Nguyen Van Thieu sin trovis ĉirkaŭpremita en senelirejo. Por eviti kompletan pereon de la sajgona potenco, li proklamis sian deoficiĝon, sub premo ankaŭ de la usona imperiismo. Tio estas neevitebla fatalo por ĉiuj reakciuloj.

La grandaj venkoj de la sudvjetnamaj armeo kaj popolo donis pezan baton al la kliko de Nguyen Van Thieu. La malvenko de la kliko estas neevitebla rezulto de ĝia obstina praktiko de faŝismaj militemaj reakciaj politikoj.


La ĉina popolo ĉiam tutforte subtenas la vjetnaman popolon en ĝia justa batalo. Ĝi opinias, ke estas absolute netolereblaj la krimoj de sajgona aŭtoritato por detrui la parizan interkonsenton. Se la kliko de Nguyen Van Thieu ankoraŭ ne volas akcepti la lecionon de sia malvenko, daŭre detruas la parizan interkonsenton kaj lanĉas militon, ĝi certe ne povas eviti kompletan pereon.



La Sudvjetnama Liberiga Armeo liberigis la urbon Da Nang en la 29-a de marto. La foto montras, ke urbanoj varme bonvenigas la trupon.



Post plena liberigo de Da Nang, rapide stariĝis bona ordo. Jen gejunuloj propagandas sur strato.



Tanko de la malamiko kaptita de la Sudvjetnama Liberiga Armeo en la batalo por liberigi la urbon Hue.




En la 26-a de marto, la sudvjetnamaj armeo kaj popolo liberigis la provincon Thua Thien. Jen batalanto kaj gerilaninoj kune transpasas riveron.



Nacimalplimultaj junulinoj de Kom Tum, Sudvjetnamio, aliĝis al gerila taĉmento por defendi sian hejmlokon.



Liberigitaj vilaĝanoj en la provinco Quang Ngai en Sudvjetnamio detruas militajn konstruajojn instalitajn de la kliko de Nguyen Van Thieu.



Batalantoj de la Sudvjetnamaj Popolaj Liberigaj Armitaj Fortoj atakas la urbon Hue.

Sudvjetnamaj pupar-
meanoj post terura mal-
venko en la kampanjo
ĉe Ban Me Thuot.



Fuĝantaj puparmeanoj sur la ŝoseo
n-ro 1 post ricevo de frakasa bato al
ilia trupo fare de la armeo kaj popolo
de Sudvjetnamio





La armeo kaj popolo de Sudvjetnamio
liberigis Pleiku, la provincan ĉefurbon
de Gia Lai. Jen sajgonaj puparmeanoj
en panika fuĝado.

# Amikeco sub la Senombra Lampo

## — Pri la Ĉina Studa Grupo de Korkirurgio en Argentino


de ĴEN HJUANHIN

### I

De julio 1974 ĝis januaro 1975, la Ĉina Studa Grupo de Korkirurgio faris studan viziton al Argentino.

Julio estis la plej frosta sezono por Buenos-Ajreso, la ĉefurbo de Argentino. La eksterdoma temperaturo malleviĝis jam ĝis 0°C, tamen varma atmosfero regis en la korkirurgia operaciejo de la hospitalo Italio. Sub la senombra lampo kelkaj ĉinaj kaj argentinaj kuracistoj absorbite faris operacion al paciento.

En sia studado, la ĉinaj kuracistoj trovis aktivan subtenon de la argentinaj registaro kaj amikoj. Akceptante ilin la ministro de la socia bonstatiga afero Lopez Rega esprimis varman bonvenigon al ili. Ankaŭ la ŝtata ekssekretario de publika sano de ministerio de



*Argentinaj kaj ĉinaj kuracistoj kune faras operacion por transplanti korvalvan membranon.*

la socia bonstatiga afero Liotta kaj ĝia nuna sekretario Yanez donis fervoran zorgon al ilia laboro.

En ĉirkaŭ cent korkirurgiaj operacioj kaj pli ol cent simpozioj dum la duonjaro, la ĉinaj kuracistoj kaj iliaj argentinaj kolegoj kune esploris, reciproke lernis kaj strikte kunlaboris, kaj dank' al tio ili levis sian teknikan nivelon kaj starigis inter si sinceran amikecon.

## II

La hospitalo Italio sidanta en la centro de Buenos-Ajreso estas sinteza hospitalo kun historio de pli ol cent jaroj. Ĝia korkirurgio ĝuas renomon en kaj ekster Argentino. La ŝtata ekssekretario de publika sano de Argentino kaj fame konata korkirurgo D-ro Liotta estas estro de tiu fako de la hospitalo. La plejparto de la studa aktivado de la ĉinaj kuracistoj estis farata en tiu fako.


Informiĝinte ke baldaŭ venos ĉinaj kolegoj, la hospitalo organizis "akceptan komisionon" kaj faris bonan aranĝon ne nur por la ĉiutaga vivo sed ankaŭ por teknika studado. Kuiristoj de la hospitala manĝejo preparis por la ĉinaj amikoj bongustajn manĝaĵojn, flegistinoj pretigis necesajn aparatojn kaj uniformojn kaj libroadministrantoj liveris al ili librojn kaj materialojn favore al la studado. La estro de la hospitalo varme diris dum intervidiĝo kun la ĉinaj kuracistoj: "Kiel en via propra hejmo, vi povas elmeti ĉian ajn demandon senĝene, kaj ni kune diskutu."

Lingvobaro kaŭzis ĝenon en scienca kaj teknika interŝanĝo. Por venki tiun malfacilon la argentinaj amikoj alprenis multajn rimedojn por helpi la ĉinajn kolegojn. Kuracisto Pichel en ripoza tempo tradukis koncernajn teknikajn materialojn de la hispana lingvo en la anglan kaj klarigis al la ĉinaj amikoj per koncizaj desegnoj. En duonjaro li faris sume pli ol 100 diversajn desegnaĵojn kaj samtempe li aktive lernis la ĉinan lingvon kaj uzis ĝin en praktikado. Li diris al la ĉinaj kuracistoj: "Nia amikeco estas profunda. Por solvi unu problemon, mi povas ĝin ripeti eĉ mil fojojn per diversaj formoj." Alia argentina kuracisto Fiore signis per hispanaj literoj ĉinajn nomojn kaj terminojn pri kora sekco kaj metado de kordukto kaj algluis ilin sur aparatoj de kontrolejo de kordukto. Dum farado de operacio por meti korduktoN li prononcis la nomojn kaj terminojn per tiuj literoj por faciligi la laboron.

Argentinaj amikoj donis entuziasman subtenon al la ĉinaj kuracistoj en ilia laboro. Kelkajn tagojn post kiam la ĉinaj kuracistoj venis al Argentino, la estro de korkirurgio D-ro Liotta kaj la vicestro D-ro Pisanu decidis, ke la ĉinaj kuracistoj faru operacion al pacientoj. D-roj Liotta kaj Pisanu ambaŭ sin okupis pri la korkirurgio multajn jarojn. Ili havas klinikajn spertojn de centoj da sukcesaj operacioj kaj ankaŭ lecionojn de malsukcesoj. Ili senrezerve kaj sincere konigis ĉion ĉi tion al la ĉinaj amikoj. Iun tagon, post kuna operaciado al paciento, Liotta detale klarigis al la ĉinaj kuracistoj gravajn punktojn de la manipulado. La estro de kardiografa fako entuziasme rakontis al ili pri malfacilaj problemoj de kardiogramo kaj diagnozo de ĝiaj eksterordinaraj kazoj. Iu profesoro de la korangia institucio de Argentino okazigis por ili 12 fakajn periodajn kursojn.

Dum restado en Argentino, antaŭtagmeze de ĉiu sabato, la argentinaj kaj ĉinaj kuracistoj de korkirurgio kunsidis por elmeti problemojn renkontitajn en la operacioj kaj kune analizi ilin por resumi spertojn. Iafoje en ripozejo aŭ ĉe gastado ili varme diskutis fakajn problemojn.

La argentina kuracisto Pichel kaj la ĉina kolego kamarado Vej sin okupas pri eksterkorpa cirkulado. Ĉiufoje dum operaciado ili kunlaboris harmonie kiel du manoj sur unu korpo. Iutage, oni devis ektomii aneŭrismon de descenda aorto al paciento de arteria sklerozo. Tamen pro trograndeco de la tumoro oni devis apliki partan eksterkorpan cirkuladon anstataŭ la ordinaran, por ke la korbato estu en normaleco dum la operacio. Pichel kaj kamarado Vej prenis sur sin la taskon. Harmonie laborante ili reguligis de tempo al tempo la ellasan kvanton el vejno kaj per-



*Argentinaj kaj ĉinaj kuracistoj diskutas pri faka problemo.*

fuzitan kvanton al arterio, tiel ke la sangpremo ĉiam sin tenis en ideala nivelo, kaj garantiis per tio sukceson de la operacio de 133 minutoj.

### III

La argentinaj kuracistoj ne nur helpis la ĉinajn kolegojn plenumi studan laboron, sed ankaŭ volis scii kaj ofte propagandis diversajn sukcesojn de la ĉina medicino. Ili admiris la principojn kaj linion de la ĉina medina afero kaj havas grandan intereson pri novaj aferoj en tiu flanko. Argentina anestezisto Denjelo ne nur konigis al la ĉinaj kuracistoj sian sperton pri anestezado, reaktivigo de koro kaj uzo de elektrona kontrolilo, sed ankaŭ fervore propagandis al argentinanoj la ĉinan akupunkturan anestezadon. Li rekomendis la ĉinajn anestezistojn ĉeesti du argentinajn kunsidojn pri anestezado kaj dekfoje petis ilin rakonti al argentinaj kolegoj pri klinika sperto de akupunktura anestezo, kaj iafoje, li prenis sur sin eĉ la taskon esti interpretisto de la angla lingvo en la hispanan. Foje, Denjelo devis eltiri denton. Por persone sperti efikon de la akupunktura anestezo li petis ĉinan kuraciston Ĉen fari al li anestezon. Aliafoje, li tordis al si la maldekstran piedon, kaj ne povis piediri pro doloro. Li diris, ke tio estas alia bona ŝanco por sperti efikon de la akupunkturado kaj petis kuraciston Ĉen fari al li akupunkturadon. Post dekkvin minutoj li jam povis paŝi kaj la doloro multe mildiĝis. Post tio li ĉie propagandis, ke akupunktura anestezo havas bonan efikon en mildigo de doloro.

La teknika interŝanĝo inter argentinaj kaj ĉinaj kuracistoj estis plena de spirito de amika kunlaboro kaj reciproka lerno, ĉar ili ĉiuj suferis de teknika monopolo de imperiistoj kaj la t.n. "disvolviĝintaj landoj". Iu argentina kuracisto bone diris: "Sincera amikeco estas la bazo de kunlaboro. Argentino kaj Ĉinio ambaŭ apartenas al la tria mondo, kaj estas egalaj en politiko."

Rapide forpasis la duonjaro. Kiam la ĉinaj kuracistoj finis sian studadon, estis jam somermezo en Argentino. Adiaŭante sur internacia aerodromo Ezeiza de Buenos-Ajreso, la amikoj de ambaŭ landoj kuraĝigis unuj la aliajn kaj deziris reciproke novajn sukcesojn en la venonta jaro kaj ke la amikecaj floroj estu ankoraŭ pli freŝaj.

# Kapro Revenis al la Mastro

Pentrita de **Ĝaŭ Ĝenvan**




Kiu perdis kapron? Venu al nia loĝejo por ĝin preni.
Forpasis jam tri tagoj, sed neniu venis por preni la kapron.
8.
Hiaŭjan, por kio vi portas brikojn en frua mateno?
Mi starigas stalon por la kapro.
9.
Vi ruĝaj gvardianetoj kondutis bonege.
10.
Ho ve, malfeliĉe!
!!!
11.
Avino, la kapro malsaniĝis.
12.
Aha, la kapro ne malsaniĝis sed naskos idojn.
13.
Kiel ĝojinde ke unu fariĝis tri!
Ni certe trovos la perdinton.
14.
Hiaŭjan, avo Ding, maljuna malriĉkamparano de Jušan-komunumo venas por preni la kapron.
15.
16.




## EKSPERIMENTA EKIPAĴO POR REGATA TERMONUKLEA KUNFANDIĜO KONSTRUITA EN ĈINIO

Unu malgranda eksperimenta ekipaĵo por ringforma malŝarĝo en alta kvazaŭkonstanta magneta kampo por esplori regatan termonuklean kunfandiĝon estas konstruita kaj uzata de la Fizika Instituto de la Ĉina Akademio de Sciencoj. Pli ol 800 eksperimentoj estas jam faritaj.

Tiu ekipaĵo estas unu el la vojoj por fari regatan termonuklean kunfandiĝon. Ĝia strukturo estas tre komplika kaj preciza kaj oni bezonis solvi multajn novajn teknikajn kaj teknologiajn problemojn por ĝin fari.

Dank' al la gvido de la Partio kaj praktiko de la principo de sendependeco, memdecido kaj sinapogo sur la propraj fortoj niaj junaj sciencistoj venke plenumis tiun taskon en malpli ol du jaroj.

## REGADO DE ELEKTRONA KOMPUTERO SUPER KARBOHEJTATA GENERATORA KOMPLETO SUKCESIS EN ĈINIO

La laboristoj kaj teknikistoj de la komputera grupo de Gaŭging-a Elektra Stacio sub la Ŝigingŝan-elektrejo lastatempe sukcesis anstataŭigi la manan manipuladon per uzo de elektrona komputero por regi la operacion super 100,000-kilovata karbohejtata vaporturbina generatora kompleto.

En la dua reganta ĉambro la diversaj indikantaj lampoj alterne brilas en la elektrona komputero, montrante ke la maŝinaro funkcias normale. La projekcia indikilo rapide turnis la centojn da donitaĵoj en signaloj ricevitaj de elektronaj instalaĵoj ĉe diversaj maŝinoj kaj ekipaĵoj en ciferojn kaj klare montras ilin, kiuj pere de elektra tajpilo tuj eliras en formo de sinoptika raporto. Nun la alĝustigo de maŝinoj estas faritaj de elektrona komputero.

## NOVA PLANEDETO MALKOVRITA


La nova malgranda planedo kun orbito iom neordinara estis trovita de la Ziginŝan-observatorio de la Ĉina Akademio de Sciencoj dum ĝia regula observado.

En la 28-a decembro, 1974, la nomita observatorio rimarkis malforte lumantan ĉielan korpon en la pozicio de dekstra supreniro 3 horojn 4.3 minutojn kaj de deklinacio plus 18 gradojn 13 minutojn. Ĝi moviĝas rapide al nordo kun devio al okcidento en angula rapideco de pli ol duongrado ĉiutage. Unuapaŝa kalkulo post ripetada observo montras ke ĝia pli granda radiuso estas malpli granda ol tiu de ordinaraj malgrandaj planedoj, sed ĝia ekscentreco estas pli granda. Ĝia perihelio-distanco estas nur 1.6 astronomiaj unuoj (1 unuo = proksimume 150 milionoj da kilometroj) kaj ĝia orbita ebeno klinas al tiu de la Tero en angulo de 28 gradoj.

## TURNEAS GRUPOJ DE REVOLUCIAJ MODELAJ TEATRAĴOJ

Por plivastigi la revoluciajn modelajn teatraĵojn, pli bone disvolvi ilian batalan rolon kaj kontentigi la dezirojn de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, la kultura ministerio organizis ĉiujn grupojn de revoluciaj modelaj teatraĵoj en Pekino por turnei sinsekve en 15 provincoj, urboj, aŭtonomaj regionoj, revoluciaj sanktejoj kiel Ŝaŭŝan, Ginggang-montaro, Janan, kaj la olekampoj Daking kaj Dagang. La programoj de prezentado inkludas la nove aperintajn en la lastaj du jaroj *Batalado sur Ebenaĵo*, *Rododendra Monto*, *Himno de Jimeng-montaro*, *Idoj de stepo* Ktp. Tio estas ankaŭ bona ŝanco por la artistoj lerni de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj.

# TROPIKAJ PLANTOJ DE HAJNAN-INSULO



Kafarboj



Kolekti gumon



Fotoelektra me-
zurilo por gumo



Kulturo de gumarbidoj

Flegado de olepalmoj



Pipra ĝardeno



1)
lonta anonfrukto (*Anona*
*ontana*)


2)
tela pomo (*Chrysophyl-*
*um cainito*)

3)
*ephelium lappaceum*

)
rtokarpo (*Artocarpus*
*eterophyllus*)

)
ustard-pomo (*Anona re-*
*ulata*)

)
va frukto (*Lucuma*
*rvosa*)



①




②



③

)




⑤




⑥





Kokao





Profesoro He Ging-ĝen esploras tropikajn plantojn.

Studentinoj de Instituto de Tropikaj Plantoj kolektas specimenojn.



Termezurado



# Nova Atingo en Scienca Esplorado pri Tropikaj Plantoj

POST la Liberiĝo disvolviĝis la nomita scienca esplorado de nia lando.

De la sudokcidenta limo en nia lando ĝis Tajvan-provinco, kaj de la provincoj Fugian kaj Guanghi ĝis Hajnan-insulo, estas vastaj tropikaj kaj subtropikaj regionoj. Tie la alta temperaturo, abunda pluvo kaj senprujneco en la tuta jaro favoras kreskadon de diversaj tropikaj plantoj, el kiuj iuj jam havas longan historion de kulturado. Ekzemple laŭ registro oni komencis kulturi kokosarbojn jam frue antaŭ 2,000 jaroj, kaj ankaŭ kulturado de kaŭĉukarbo en nia lando havas historion de pli ol 60 jaroj.

Tamen, en la malnova socio, sub la reakcia regado de ĉiuj dinastioj kaj Kuomintango vivis mizere la popolo, velkis ĉiuj aferoj. Abundaj tropikaj plantoj ne povis esti uzataj kaj disvolvataj kaj iliaj malmultaj restantaj specoj sin trovis en stato de memkreskado kaj memmorto.

Post la fondiĝo de la nova Ĉinio, precipe post la Granda Proleta Kultura Revolucio kaj la movado de kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio, rapide disvolviĝis la tropikaj plantoj, oble vastiĝis la kultura areo, senĉese altiĝis la pomua produktokvanto kaj la tero dorminta multajn jarojn estis iom post iom



*Riĉa rikolto de olepalmaj fruktoj*



*Elefanta dentego, speco de mango*



*Rikolto de mangoj*

eksplautata sub la direktado de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ **"sendependeco kaj memdecido kaj sinapogo sur la propraj fortoj".** Kokoso, agavo, limonherbo *(Cymbopogon citratus)*, kafo, olepalmo, kaŭĉukarbo kaj tropikaj fruktoj kaj drogherboj liveris krudajn materialojn al industrio por la socialisma konstruado de nia lando kaj ĉiutagajn vivbezonaĵojn. La kulturita areo de tiuj plantoj sur Hajnan-insulo estas nun 29-oblo de tiu antaŭ la Liberiĝo. La areo de kaŭĉukarboj estas 2-oblo de tiu antaŭ la Granda Proleta Kultura Revolucio kaj 95-oblo antaŭ la Liberiĝo. Nun Hajnan-insulo fariĝas unu el la bazoj de produkto de tropikaj plantoj de nia lando.

La Partio kaj registaro donis grandan zorgadon al la scienca esplorado de tiuj plantoj kaj al kulturado de specialaj esplorantoj. Samtempe kun disvolviĝo de amasa movado de scienca eksperimento oni establis instituciojn por esplori tropikajn plantojn kaj kulturi teknikistojn en koncernaj regionoj. Sur Hajnan-insulo nun funkcias la Sudĉinia Esplora Instituto de Tropikaj Plantoj kaj Sudĉinia Instituto de Tropikaj Plantoj. Sekvante la instruon de Prezidanto Maŭ pri la ligo de teorio kun praktiko kaj kombino de intelektuloj kun laboristoj kaj kamparanoj, la sciencaj laborantoj profundiĝis en produktadon, serioze studis kaj resumis la produktan sperton de tropikaj plantoj kaj disvolvis sciencajn esplorojn laŭ klimataj kondiĉoj de nia tropika regiono kaj karaktero de tieaj plantoj. En amasa eksperimento de selektado kaj kulturado de semoj kaj grandarea kulturado, oni unuapaŝe resumis la sperton por disvolvi tropikajn plantojn laŭ la naturaj kondiĉoj de nia lando kaj elkulturis nombron da novaj specoj kun alta produkto kaj forta rezisteco kontraŭ frosto kaj vento. Krome oni aplikis novajn teknikojn por observi kaj antaŭinformi malsanojn de tropikaj plantoj kaj iuj teknikoj kiel hormono kaj antibiotiko ricevis bonan efikon en praktiko. Ankaŭ la prilaborado kaj esplorado de sinteza utiligo al produktaĵo de tropikaj plantoj disvolviĝas kaj akiris ĝojindan frukton.




# Ĝingpo-nacio

de **ZONG MIN**

ĜINGPO-NACIO havas pli ol 100,000 membrojn. Ili ĉefe loĝas koncentre en la Dehong-a Daj- kaj Ĝingpo-nacia Aŭtonoma Subprovinco de Junnan kaj cetere en ĝiaj gubernioj Pianma, Gangfang, Gulang, Gengma, Lancang k.a. okcidente de Nugiang-rivero. Iliaj montregionoj situas ĝenerale en alteco de ĉ. 1,500 metroj super la marnivelo, kaj tie estas varmeta klimato, kreskas densaj arbaroj kaj abunde produktiĝas valoraj drogherboj kaj diversspecaj lignoj. La subtropikaj fruktoj mangoj, artokarpoj kaj cidonioj troviĝas tutjare, kaj tre abundas la ekonomiaj plantoj tearboj, kafarboj kaj bombakoj.

La ĝingpo-a lingvo apartenas al la tibetabirma lingvofamilio sub la hana-tibeta lingvosistemo kaj sin dividas ĉefe en du dialektojn ĝingpo-an kaj zajva-an. Post la Liberiĝo, sub la gvido de la Partio, la ĝingpo-oj kreis sian novan skriban lingvon, per kiu oni eldonas diversajn librojn, ĵurnalojn kaj gazetojn.

Antaŭ la Liberiĝo, la ĝingpo-a popolo vivis tragikan vivon sub regado de la reĝimo de daj-naciaj feŭdestroj kaj siaj montĉefoj. Tiam montĉefo estis la plej alta estro de ĉiu vilaĝo kaj hereda aristokrato de politika kaj milita ĉefo. La montĉefa reĝimo dividis homojn en tri klasojn — destinitajn superulojn, ordinarajn homojn kaj sklavojn — rigore diferencigitajn. La malriĉaj ĝingpo-oj ĉiujare devis plenumi servuton al la montĉefoj kaj pagi al ili objektojn ĉiufoje, kiam okazis ĉe ili geedziĝo, morto, diservo kaj domkonstruado aŭ oni akiris ĉasaĵojn. La peza ekspluatado kaj servuto kaŭzis al la ĝingpo-a popolo longtempan stagnon de la socia produkto. Precipe en la periodo de reakcia regado de Kuomintango, la reakciuloj, daj-aj feŭdestroj, bienuloj kaj montĉefoj en koluzio prirabis la

*Ĝingpo-a studentino (la maldekstra)*



ĝingpo-ojn sub diversaj pretekstoj kaj tio ĵetis ilin en mizeran abismon. La malriĉaj kamparanoj devis sin vivteni per vendo de sia laborforto kaj kolekto de sovaĝaj vegetaĵoj, ne havante sufiĉan veston por kovri sian korpon nek manĝaĵon por plenigi sian stomakon.

En la longa tempo antaŭ la Liberiĝo la ĝingpo-oj entreprenis agrikulturan produkton per primitivaj metodoj, tial la produktokvanto estis tre malalta. La bambuaĵa kaj tekstila metioj estis kompare disvolviĝintaj. Plejparto de iliaj mebloj kiel korbo, mato, tablo, seĝo, manĝoskatolo kaj kruĉo estas faritaj de virinoj el bambuo. Iam en la historio ili ĉasis per bambua pafilo, faris agrikulturan laboron per bambua pioĉo kaj kuiris rizon kaj akvon per bambua tubo. Krome ili faris frotan bruligilon el bambuo. Unuvorte, la bambuaĵoj, same kiel iloj el fero kaj argilo, ludis gravan rolon en ilia longa historio.

Ĝingpo-oj lertas en kantado kaj dancado. Pliparto de la dancoj estas kolektivaj, iufoje en dancado partoprenas pli ol mil personoj akompanate de forta muziko de ligna tamburo. La poezio de ĝingpo-oj havas stilon de sereneco kaj simpleco.

Ĝingpo-nacio estas nacio kun tradicio de heroa batalo. En la fino de la 19-a j.c. kaj la komenco de la 20-a j.c., la ĝingpo-oj multfoje leviĝis kune kun daj-oj, aĉang-oj, lisu-oj kaj han-oj por batali kontraŭ agreso de imperiistoj kaj defendi la teritorion de sia patrolando. En la jaro 1910, subtenate de la tutlanda popolo la ĝingpo-oj frakasis la agreson de la brita imperiismo al Pianma, Gangfang kaj Gulang. Dum la periodo de la Kontraŭjapana Rezistmilito ili donis fortan baton al la invado de la japana imperiisma trupo al la regiono de Nugiang-rivero.

En la jaro 1950 la suferplena ĝingpo-a popolo liberiĝis, dank' al la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio kaj Prezidanto Maŭ, kaj de tiam la ruĝa kvinstela flago ekflirtis super ĝingpo-aj montregionoj.

Dum la pli ol 20 jaroj post la Liberiĝo, sub la lumo de la naciaj politikoj de la Partio, fondiĝis la Dehong-a Daj- kaj Ĝingpo-nacia Aŭtonoma Subprovinco en la jaro 1953. De tiam la ĝingpo-a popolo ĝenerale starigis interhelpajn grupojn kaj poste efektivigis kooperigon en la jaro 1961, dank' al kio ili iom post iom abolis la feŭdan ekspluatan kaj subpreman sistemon. En la Granda Proleta Kultura Revolucio ili fondis popolkomunumojn. Observante la ĝeneralan principon de disvolvo de la nacia ekonomio elmetitan de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ **"preni agrikulturon kiel bazon kaj industrion kiel gvidan faktoron"**, la ĝingpo-oj aktive kondukis en la lastaj jaroj la amasan movadon **"Lerni de Daĝaj en agrikulturo"** kaj anstataŭigis la primitivan metodon en agrikulturado per scienca. Ili turnis praarbarojn en teajn kaj fruktajn ĝardenojn kaj la dezertajn montojn mil jarojn dormantajn en teraskampojn, kio havigis al ili riĉan rikolton en multaj sinsekvaj jaroj. Ni prenu la ĝingpo-an montregionon de Menghiu en Ĵujli-gubernio kiel ekzemplon: Antaŭ la Liberiĝo la jara produktokvanto de greno en tiu regiono estis nur kelkcent mil ĝinoj (1 *ĝin*-o = ½ kg.), sed tiu en 1971 estis jam pli ol ses milionoj da ĝinoj. Nun ili ne nur sufiĉe sin provizas per memproduktita greno, sed ankaŭ povas liveri ĝian superfluan parton al la ŝtato por subteni la socialisman konstruadon.

Antaŭ la Liberiĝo troviĝis neniu industrio en la ĝingpo-aj regionoj, eĉ la simplaj instrumentoj kiel pioĉo, plugilo, ferkaldrono, hakilo kaj falĉilo estis liveritaj de aliaj lokoj. Post la Liberiĝo la Partio kaj la ŝtato donis grandan zorgon al la ekonomia konstruado de nacimalplimultoj en la limregionoj. Por akceli disvolviĝon de tiea industrio, oni transportis tien instalaĵojn kaj ekipaĵojn kaj sendis laboristojn kaj teknikistojn. Nun tie formiĝis la reto de malgrandaj industriaj entreprenoj ĉefe de agrikulturaj maŝinoj kaj cetere de elektro, kemisterko, cemento, sukero, papero, kemiaĵo, karbo kaj manĝaĵo. La unua generacio de ĝingpo-aj laboristoj sane kreskas.

Kun la rapida disvolviĝo de la socialisma revolucio kaj konstruado, sur alta kaj kruta

Ĝingpo-monto ŝtonoza estis konstruita ŝoseo, instalitaj alttensiaj elektrodratoj kaj disaŭdiga sistemo kaj starigitaj novaj tegoldomoj vicon post vico. Krome multaj familioj aĉetis radioricevilojn kaj kudromaŝinojn. Novaj hidroelektrejoj alportas lumon al la ĝingpo-aj vilaĝoj kaj finis la historion de mil jaroj, dum kiuj oni uzis kenan torĉon por lumigo.

Antaŭ la Liberiĝo la ĝingpo-a popolo ne havis kulturan, edukan kaj higienan aferojn. Tiam ili "nodadis ŝnuron por memori aferojn kaj gravuris signojn por nombri" kaj ĉie cirkuladis malario kaj aliaj epidemioj. La mizero kaj epidemioj kaŭzis al la ĝingpo-oj altan procenton de morto. La vilaĝo Ĝefanglongmo en Luhi-gubernio origine havis 70 familiojn, sed dum dek jaroj antaŭvespere de la Liberiĝo restis nur 3 familioj pro morto kaj forfuĝo. Post la Liberiĝo, sub la gvido de la Partio en la regionoj de ĝingpo-oj oni kulturis nombron da kadroj kaj kompartianoj kaj fondis bazajn organizojn de la Partio. Ĉiu komunumo kaj ĉiu produkta brigado havas lernejon, hospitalon kaj kuracejon, kaj efektivigis kooperan kuracsistemon. Nun la ĝingpo-a popolo pli amas la grandan gvidanton Prezidanton Maŭ, la Komunistan Partion de Ĉinio kaj la socialisman patrolandon. Nun ĝi kondukas la movadon de kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio ĝenerale, profunde kaj longdaŭre, kritikas la kontraŭrevolucian reviziisman linion de Lin Biaŭ, kiu intencis restaŭri kapitalismon kaj ĵeti nian diversnacian popolon en mizeran maron, kritikas la reakcian doktrinon de Konfucio, kaj faris firman decidon konduki la socialisman revolucion ĝis la fino.




## FABRIKO DE VITROFIBRE ARMATURITAJ PLASTAĴOJ FONDIĜIS EN GUANGHI

La Jiŝan-a Fabriko de Vitrofibre Armaturitaj Plastaĵoj, la unua en Guanghi, estas jam konstruita kaj komencis produktadon. La vitrofibre armaturita plasto estas nova industria materialo. Ĝi estas kompare malpeza, kun alta forteco, rezistema kontraŭ alta temperaturo kaj kemia korodo kaj havas bonan dielektrikecon. Pro tio ĝi povas esti uzata iuokaze anstataŭ ŝtalo, asbesto kaj ligno. La nomita fabriko jam povas produkti diversajn teksaĵojn kaj rubandojn el tiu materialo. Ĝi povas produkti ankaŭ ujojn acid- kaj alkal-rezistajn, cisternojn por nafto kaj izolajn plat- kaj tub-materialojn.

## GRANDA ATINGO EN UTILIGO DE RUĜA GRUNDO


En 11 provincoj de suda Ĉinio, Hunan, Gianghi k.a., 41.7% de ilia areo estas el ruĝa grundo. Tiu grundo havas altan acidecon, sed malmultajn azoton kaj fosforon sen organikaj substancoj. Ĝi estas viskoza kaj facile kompaktiĝas kaj ne povas bone teni en si akvon kaj sterkon. Antaŭe, iuj burĝaj grundsciencistoj ĝin nomis "ruĝa dezerto" kaj opiniis ke ĝi estas nereformebla kaj tute ne povas kreskigi plantojn. Sed, en la amasa movado de "Lerno de Daĝaj en Agrikulturo", post ripetada praktikado la vastaj amasoj kaj agronomoj en suda Ĉinio sukcesis trovi vojon por reformi ĝin kaj atingis grandajn venkojn. Laŭ nekompleta statistiko de la 11 provincoj kaj regionoj, nun, la areo de uzata ruĝa grundo jam atingis pli ol 7,000, 000 hektarojn. Kaj estas konstruitaj grandaj nombroj da riĉrikoltaj kampoj certigitaj en sekeco kaj akvoabundeco. Sur la antaŭaj ruĝaj kalvaj montoj, hodiaŭ jam aperis multaj kampoj kaj kulturejoj de teo, fruktoj kaj kaŭĉukarboj.

ĜONG FANG:

# La Tria Mondo Disvolviĝas kaj Fortiĝas en Batalado

KE la tria mondo fariĝis ĉefa forto en la batalo kontraŭ koloniismo, imperiismo kaj hegemoniismo, tio estas la nepra tendenco de la historio kaj rezulto de la ĉiam pli kreskanta vekiĝo kaj fortiĝo de la subpremataj nacioj kaj popoloj de Azio, Afriko kaj Latinameriko.

Post la Dua Mondmilito, la tajdo de naci-liberiga movado volvis Azion, Afrikon kaj Latinamerikon. Popoloj de multaj landoj kuraĝe leviĝis al kaj longtempe persistis en la armita batalado kontraŭ koloniismo, imperiismo kaj hegemoniismo, kaj en tio senĉese aperis brilaj ekzemploj, ke malgrandaj kaj malfortaj landoj venkis la grandajn kaj potencajn. En la t. n. kvieta Afriko, multaj landoj jam sendependiĝis kaj antaŭen marŝas brave. En Latinameriko antaŭe rigardata de imperiismo kiel "postkorto", ekbrulis indigna fajro de batalo kontraŭ hegemoniismo. La aziaj popoloj, kiuj longtempe suferis subpremadon de imperiismo kaj



*Seka doko de Malto*



*Huraas batalantoj de la Angolaj Patriotaj Armitaj Fortoj antaŭ konkerita fortikigita punkto de la malamiko.*

superpotencoj, akiris venkojn unu post alia. En la batalado, multaj landoj de la tria mondo trapikis la papertigrojn de koloniismo, imperiismo kaj hegemoniismo, malkovris ilian esencon aspekte potencan sed fakte malfortan kaj rompis la miton ke ili estas nevenkeblaj. La longtempa armita batalado farata de multaj landoj de la tria mondo senĉese donas pezan baton al la koloniismo kaj imperiismo, kaj ĵetis ilin en panikan kaj senelirejan situacion. Precipe en la lastaj kelkaj jaroj, multaj landoj de la tria mondo klare vidis la frenezan ambicion de Usono kaj Sovetunio por teni hegemonion super la mondo, kaj faris pint-kontraŭ-pintan bataladon kontraŭ ili. El la malbelaj prezentadoj de la reviziismo, multaj landoj kaj popoloj de la tria mondo pli profunde konis la naturon de la social-imperiismo, kaj sekve pli firme direktas sian batalan lancpinton al tiu danĝera malamiko. Unuvorte, la unuiĝinta batalo de ĉiuj landoj de la tria mondo jam pruvis antaŭ la tuta mondo, ke koloniismo, imperiismo kaj hegemoniismo estas tute venkeblaj.

La disvolviĝo kaj fortiĝo de la tria mondo kaŭzis grandan kaj profundan ŝanĝon al la politika situacio de la mondo. Granda nombro da malgrandaj kaj malriĉaj landoj, kiuj suferis sklavigon, prirabadon, regadon kaj ekspluatadon, stariĝis, kuraĝe faris intensan atakon kontraŭ imperiismo kaj social-imperiismo kaj formis grandan revolucian fluon. La unuiĝo kaj batalo de la tria mondo ludis gravan rolon sur la internacia politika sceno. Imperiismo kaj social-imperiismo sin trovis en pasiva stato esti batitaj, ilia ordonbastono ja ne plu efikis, kaj ankaŭ iliaj minacado, ĉantaĝado ktp. ne povis ilin savi el tiu situacio. La organizo de Unuiĝintaj Nacioj antaŭe uzita de la superpotencoj kiel maŝino de voĉdonado kaj batalilo por hegemonio, hodiaŭ fariĝis grava loko, kie la tria mondo malkaŝas, akuzas kaj riproĉas iliajn krimojn. En la Sesa Speciala Kunveno de la Ĝenerala Asembleo de la Unuiĝintaj Nacioj kunvokita en aprilo de la lasta jaro, la reprezentantoj de la landoj de la tria mondo severe kaj juste riproĉis la potencan politikon kaj hegemoniismon de la du superpotencoj per multaj nerefuteblaj faktoj. Multaj mezgrandaj kaj malgrandaj landoj, kiuj antaŭe estis malestimataj de aliaj, stariĝis kun alta batalvolo kaj kura-



*Nova sidejo de la Ĝenerala Oficejo de la Mozambika Liberiga Fronto en Lourenco Marques, la ĉefurbo de Mozambiko.*

ĝis meti la du superpotencojn en panikan akuzitecon. Tio vere estas ke "floroj falas for, nenion oni povas fari". En multaj internaciaj konferencoj de la Unuiĝintaj Nacioj, kiel tiuj pri marleĝo, mondaj loĝantoj kaj monda greno, la landoj de la tria mondo kondukis intensan kaj akran unuigitan bataladon kontraŭ hegemoniismo, kaj per tio ili foje kaj refoje senmaskigis la social-imperiismon kiel "naturan aliancanon" de la tria mondo. En la Unuiĝintaj Nacioj kaj internaciaj aferoj, unu aŭ du superpotencoj ne plu povas agi laŭplaĉe kiel antaŭe.

La landoj de la tria mondo stariĝis ne nur en politiko sed ankaŭ en ekonomio. En la lastaj jaroj, en internacia ekonomia sfero la batalo farita ĉefe de la disvolviĝantaj landoj kontraŭ ekspluatado, prirabado, regado kaj krizotransigo profunde disvolviĝas. La efika batalo de arabaj landoj kun nafto kiel armilo malfermis la vidkampon de la popoloj. Sub la kuraĝigado de la granda venko de la nafto-eksportantaj landoj, multaj landoj eksportantaj krudmaterialojn kaj agrikulturajn produktaĵojn sin organizis por defendi siajn ekonomiajn rajtojn kaj interesojn. Sole en la lasta jaro, la tria mondo jam fondis 7 organizojn de la landoj eksportantaj aluminion, feron, hidrargon, oledonajn materialojn, sukeron, bananon kaj viandon. Ankaŭ multaj regionaj organizoj pri ekonomia kooperado fondiĝis unu post alia. La disvolviĝantaj landoj interŝanĝas inter si eksportaĵojn kaj plie disvolviĝas iliaj ekonomia kaj komerca interrilatoj fonditaj sur la bazo de egaleco kaj reciproka utilo. La vigle leviĝanta movado por defendi naciajn riĉfontojn kaj limigi fremdlandajn kapitalojn forte batis la ekonomian hegemoniismon de la du superpotencoj. Por atingi kompletan ekonomian sendependecon, multaj landoj de la tria mondo aktive disvolvas sian nacian ekonomion. Nun pliprofundiĝas la batalo de la tria mondo por la ĝisfunda ŝanĝo de la internacia ekonomia interrilato.

De longa tempo la tria mondo suferis la sovaĝan sklavigon kaj kruelan ekspluatadon de koloniismo, imperiismo kaj hegemoniismo. Tamen ju pli multe ili suferis subpremadon, des pli forte ili rezistis. Por la tria mondo, koloniismo, imperiismo kaj hegemoniismo servas kiel negativaj instruistoj. La historiaj kaj realaj spertoj kaj lecionoj profunde komprenigis ilin, ke se ili volas vivi, sendependiĝi kaj marŝi antaŭen, ili do devas batali. Tial, ili ne timas malfacilojn, kuraĝas en batalado kaj donas fortan baton al koloniismo, imperiismo kaj hegemoniismo.

La tria mondo havas vastan teritorion, abundan riĉfontojn kaj grandan nombron da loĝantoj. En la pasinteco, koloniismo kaj imperiismo rigardis la trian mondon kiel sian "fidindan postfronton" kaj "neelĉerpeblan" rezervujon. Nun pro la vekiĝo kaj fortiĝo de la tria mondo, la "fidinda postfronto" jam transformiĝis en la plejfronton kontraŭ koloniismo, imperiismo kaj hegemoniismo. Tio

multe ŝanĝis proporcion inter la internaciaj fortoj.


En sia granda batalado kontraŭ koloniismo, imperiismo kaj hegemoniismo, la tria mondo konis pli profunde, ke se nur malgrandaj kaj malriĉaj landoj unuiĝos kaj kuraĝe kaj persiste batalos, do ili povos venki la grandajn kaj fortajn imperiismon kaj superpotencojn. En la lastaj kelkaj jaroj, la landoj kaj popoloj de Azio, Afriko kaj Latinameriko helpis reciproke, batalis kune kaj tiel fariĝis granda forto en opono kontraŭ imperiismo kaj superpotencoj.

Sennombraj faktoj montris, ke hodiaŭ la sorto de la mondo estas decidita ne de imperiismo kaj superpotencoj, sed de la popoloj de Azio, Afriko kaj Latinameriko kaj de la aliaj partoj de la mondo. La epoko, en kiu unu aŭ du superpotencoj laŭvole tiranas super la mondo, jam forpasis por ĉiam. Nun ne la landoj kaj popoloj de la tria mondo timas la superpotencojn, sed la lastaj timas la unuajn. Vere fortaj estas la unuiĝintaj tria mondo kaj la popoloj de ĉiuj landoj, kiuj kuraĝas batali kaj venki.


La granda gvidanto de la ĉina popolo Prezidanto Maŭ montris: **"La revolucia ŝtormo de Azio, Afriko kaj Latinameriko certe donos decidigan kaj frakasan baton al la tuta malnova mondo."**

En la "Raporto pri la Laboro de la Registaro" al la Kvara Tutlanda Popola Kongreso ĉefministro Ĝoŭ Enlaj montris: "La tria mondo estas ĉefa forto en opono kontraŭ koloniismo, imperiismo kaj hegemoniismo. Ĉinio estas disvolviĝanta socialisma lando kaj apartenas al la tria mondo." La komunaj travivaĵoj kaj komuna batalo strikte ligas la ĉinan popolon kun tiuj de la tria mondo. Ni firme subtenas la justan batalon de la landoj kaj popoloj de la tria mondo por akiri kaj protekti nacian sendependecon, defendi la ŝtatan suverenecon kaj disvolvi nacian ekonomion. Ni profunde kredas, ke kvankam la batalado de la tria mondo kontraŭ koloniismo, imperiismo kaj hegemoniismo estas longtempa kaj malfacilega, kaj la vojo estas zigzaga, tamen ili certe gajnos pli grandan venkon, se nur ili fortigos sian solidarecon, unuiĝos kun kaj akiros subtenon de la dua mondo kaj persistos en batalo.

*Ŝtataj aĉetistoj de agrikulturaj produktaĵoj de Zambio aĉetas maizon.*



*Laboristo de zaira kuprofandejo laminatas kuproplatojn.*



*Sur la Kovrilo:*

Spektantetoj

KOREKTOJ

1. "Prebidantaro" en la 5-a linio kaj "Hidoĉinio" en la 2-a linio de la dekstra kolono sur p. 1 de la aldonaĵo "Gratulo de Ĉinaj Partiaj kaj Ŝtataj Gvidantoj pro la Liberigo de Sajgono" estu legataj "Prezidantaro" kaj "Hindoĉinio" respektive.
2. "Futong" en linio 15, dekstra kolono, p. 26 estu legata "Futang".
3. "vasteco" en linio 1, maldekstra kolono, p. 33 estu legata "malvasteco".



EL POPOLA ĈINIO 中国报道

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO
P.O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio


Ĝenerala distribuanto: Guozi Shudian (Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj), P.O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio

N-ro 6 (203) 1975

## Ĉefa Enhavo


Forpasis kamarado Dong Bivu . . . . . . . . . . . . . . 1
Funebra parolado de vicprezidanto Je Gianjing . . . . 3
Vojo de virina liberigo de Ĉinio . . . . . . . . . . . . 11
Virinoj sur gvidaj postenoj . . . . . . . . . . . . . . . 17
Granda rolo ludata de virinoj en nia konstruado . . . 22
Sanprotekto al virinoj kaj infanoj en la nova Ĉinio . . 25
Malfermo de feliĉa fonto por dekmilo da generacioj . . 29
Ne por ĉasi profiton . . . . . . . . . . . . . 34
Meteologiaj studoj sur altebenaĵo . . . . . . . . . . . 36
La mano de l' sekretario de partia komitato . . . . . . 39
Amikeco sub la senombra lampo . . . . . . . . . . . 41
Nova atingo en scienca esplorado pri tropikaj plantoj 47
Ĝingpo-nacio . . . . . . . . . . . . . . . . 49
La tria mondo disvolviĝas kaj fortiĝas en batalado 52


# Dali de Junnan



Por elhaki marmoron







Dali-gubernio de nia Junnan-provinco kun pitoreskaj montoj kaj akvoj havas belajn pejzaĝojn. Inter ĝiaj famaj vidindaĵoj kaj antikvaj postrestaĵoj estas Tripagoda Templo, Papilia Fonto, Marmeza Pavilono k.a. La gubernio produktas marmoron, kiu portas ĝian nomon en la ĉina lingvo.

La marmoro tie produktata estas renoma ankaŭ eksterlande pro siaj apartaj subtileco, polureco kaj varieco de vejnoj. Antaŭ tre longe oni jam komencis ekspluati ĝin. Sed en la longaj pasintaj jaroj, la marmoraĵoj servis kiel ŝatataĵoj nur por malmultaj reakciaj regantoj. Kapitalistoj malkare aĉetis la krudan marmoron por akiri superprofiton, kaj aldone la kuomintangaj reakciuloj kruele tretis kaj subpremis la marmoristojn, tiel ke la produkto de marmoro antaŭ la Liberiĝo depresiiĝis tagon post tago.

Post la Liberiĝo, dank' al la zorgo de la Partio kaj la registaro, ĝia produktado restariĝis. En 1958, la jaro de la Granda Antaŭensalto, oni fondis prilaborejon de marmoro kaj la laboristoj unuafoje ekuzis maŝinojn anstataŭ la manlaborado heredita de miloj da jaroj, tiel ke la produkto kreskis de jaro al jaro. Precipe post la Granda Proleta Kultura Revolucio, tute nova fizionomio prezentiĝis en la marmora produktado. Nun en la produkto de konstruaj materialoj oni tute efektiviĝis mekanikigon. Ankaŭ la produkto de marmoraj metiartaĵoj leviĝis grandskale, kaj la sortimento kreskis de pli ol dek specoj ĝis pli ol kvindek kun senĉese pliboniĝanta kvalito.

Sur la dorskovrilo: Pejzaĝo de Dali



世界语《中国报道》一九七五年第六期（本刊代号：二——九一五）